

Bulteno de la Nordfrancia Esperanto-Federacio – Fondita en 1908



La Vorto de la Prezidanto

Laboro kaj plezuro!

“ La jubilea 25a Eŭropa Renkontiĝo ĵus okazis en Stella-Maris, ĉi tiun lastan semajnfino. Kiaj agrablaj momentoj! De 8 landoj venis 82 gepartoprenantoj, ili plezure frandis la agrablajn lokojn, la varman etoson, la buntan spektaklon kaj la diversajn “kursojn” aŭ “atelierojn”. Multaj aĉetis kaj – mi esperas – legos interesajn librojn. Fakte ankaŭ mi havas en miaj ŝrankoj kelkajn librojn, kiujn mi aĉetis kaj promesis legi kiam mi emeritiĝos... Tamen promesoj povas esti facile fareblaj sed kelkfoje malfacile plenumitaj, ĉu ne? Dankon al Arlette kaj Edmond PLUTNIAK, kiuj kuraĝe kaj entuziasme reprenis la torĉon de France kaj Richard VALET, kaj gratulojn al Jean DIETRICH, kiu iniciatis antaŭ 24 jaroj tiun ĉiujaran kaj plej gravan eventon norde de Parizo.

Dankon al ĉiuj, kiuj esperas partopreni kaj promesas helpi por tiu grandega jubilea centa Universala Kongreso, kiu okazos en Lillo la lastan semajnon de Julio 2015. Unua grava renkonto por ĉiuj venontaj helpantoj okazis dimanĉon la 8an de Decembro en Parizo, ĉe la sidejo de UFE. Dankon al Julia HEDOUX kaj al Xavier DEWIDHEM

Sekvo p. 2 . . .

## 25-a Jubilea Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage Okdek-du partoprenantoj, naŭ landoj

**Dimanĉon 17-an de Novembro, 18-an horon,** la feriejo *Stella-Maris* malpleniĝas, la ĉi-jara Eŭropa Rendevuo ĵus finiĝis. Post la lastaj kisoj, kiujn ni interŝanĝas kun la forirantaj amikoj, ni enaŭtiĝas por reveturi hejmen. Ni tiom bone konas la vojon, ke mi (*Arlette*) stiras la aŭton preskaŭ aŭtomate. Survoje mi kun la edzo *Edmond* senĉese babilas. La bildoj kaj impresoj de la du trapasitaj tagoj tiel forte kirliĝas, ke ni eĉ ne konscias pri la vojo.

Ni jam atingas *Saint-Pol-sur-Ternoise*, ni ne memoras, ĉu ni jam transpasis la urbeton *Humières*, lokon, kie iam ni ricevis monpunon pro tro rapida veturado. Neniu atenton ni havis tie, ni esperu, ke ĉifoje mi ne veturis tro rapide!

Pluraj sentoj miksiĝas: ĝojo, ekscitiĝo, laceco.

Post pluraj monatoj da interrilatoj kun nia kasisto *Xavier VILAIN* (kiu ni denove dankas pro la farita laboro), post la kutimaj streĉoj konstati, ke la aliĝoj ne alvenas, kun la sento de laceco pro sufiĉe peza organizado, kun la konstanta demando “ĉu valoras elspezi tiom da energio se finfine malmulte da

personoj interesiĝas pri la afero?”... post la lastminutaj aliĝoj, kiuj ŝanĝas la nombrojn jam anoncitan al la estro de la feriejo, kaj devigas ŝanĝi la disdonadon de la dormo-ĉambroj, la jam faritajn listojn, post... , post... , ni atingas sufiĉe kontentigan nombron de partoprenantoj: 82 personoj aliĝis! Uf!!!



Kiam ni alvenis sabaton matene, pluraj amikoj jam estis surloke, kelkaj eĉ de pluraj tagoj. Efektive, en la agrabla feriejo de *Stella-Maris* eblas plilongigi sian restadon. Kutime ankaŭ ni alvenas la antaŭan tagon, sed pro malglatiĝo ĉi-foje ne eblas.

Ĉiujare ni kutimas danki la diversajn kursgvidantojn je la fino de la aranĝo per eta donaco.

Por la jubilea Rendevuo ni planis donaci la libreton “*Vincent VAN*

pro iliaj sindediĉoj al la organizo de tiu belega projekto.

Kuraĝon al ĉiuj, kiuj partoprenas kurs-ojn kaj ankaŭ al ties kursgvidantoj. Fine de la lernojaro, de pluraj jaroj ni organizas regione KER-ekzamenojn en Araso kaj FEI-ekzamenojn en Lillo. Eble nia regiono estas eĉ la ĉampiono laŭ la nombroj de kandidatoj kaj de sukces-intoj.

Esperante renkonti vin dum la diversaj Esperantaj aranĝoj, mi deziras al ĉiuj sanon kaj feliĉon kaj plej agrablajn jarfinajn festojn! //

Michel DECHY



**GOGH à la mine**". La kursaro pri **VAN GOGH**, kiun gvidis **Katalin** en *Stella-Maris* en 2011, donis al ni la emon organizi nian jaran Rendezvon en tiu agrabla loko, feriejo de poldevenaj ministoj.

Sed... kvankam ni mendis la libretojn antaŭ du semajnoj, kvankam ni telefonis plurfoje al la eldonejo "*La boutique des lecteurs*" de la *Voix du Nord*, kvankam ni kontaktis la poŝtoŝefojn la matenon mem de nia foriro al *Stella-Plage*, neniu pakajo alvenis kaj ni devis foriri iom malfrue, tre ĉagrenitaj. Tamen ne tiel gravis, inter amikoj ni povis klarigi la okazaĵon, ni sendos la donaceton pli poste.

La aranĝo mem komenciĝas tuj post la tagmanĝo, sed jaron post jaro pli kaj pli da personoj alvenas ekde la mateno. Por la neinkluzivita tagmanĝo ĉeestis 40 personoj, inter ili pluraj ne antaŭanoncis sin kiel petite en la aliĝilo. Feliĉe ke la estro kaj la kuiristo de la feriejo estas tre komprenemaj, ili finfine sukcesis manĝigi ĉiujn. Eble venontjare, ni devos reorganizi la aliĝilon alimaniere?

Post la disdonado de ŝlosiloj, de nomŝildoj, post akcepta kafo kun biskvitoj, jen la malfermo, dum ni akceptis la 82 partoprenantojn.

9 landoj estis reprezentitaj: Francio, Belgio, Nederlando, Germanio, Finnlando, Hungario, Ĉekio, Portugalio, Litovio. Ni dankis kaj gratulis ĉiujn partoprenantojn, aparte tiujn, kiuj venis de foraj urboj: niaj samideaninoj de Berlino kaj de *Pori* en Finnlando. La tradicia prezentado de la kursgvidantoj ebligis al la ĉeestantoj rememorigi la elektitan kurson:

- Lernado de la lingvo kun **Katalin KOVÁTS** (17 personoj aliĝis inter ili 8 veraj komencantoj kaj 9, kiuj interesiĝas pri la moderna instruado de *Katalin*.)
- Konversacia rondo kun **Michel DECHY** kaj lia amiko Tinĉjo (19 personoj aliĝis)
- La nuntempa literaturo kun **Anne JAUSIONS** (12 personoj aliĝis)
- Ateliero pri kantado en koruso kun Franjo **LÉVÊQUE** (23 personoj aliĝis).

Post la bonvenigaj vortoj de nia nova prezidanto **Michel DECHY** kaj de la organizantoj, estis granda honoro por la 17 partoprenantoj, kiuj brile sukcesis la KER-ekzamenojn en Junio 2013, ricevi siajn belajn diplomojn de la manoj de **Katalin KOVÁTS**.

La granda akceptejo rapide malpleniĝis, kaj ĉiu postsekvis sian kursgvidanton por 4-hora instruado en plezuriga etoso. Dum la diversaj kaf-paŭzoj, la tuta ĉeestantaro retrovis sin en la granda akceptejo, kie kuŝis la bela libro-servo de la klubo de **FEL** prizorgata de niaj belgaj amikoj **Hans DELNAT** kaj **Katja LODOR**. Multaj libroj vendiĝis.

Denove okazis belega ekspozicio de artaĵoj, verkoj de niaj talentaj esperantistoj: mirindaj vitralaĵoj de **Katalin KOVÁTS**, buntaj diversstilaj pentraĵoj de **Francine LONGUE-ÉPÉE**, **Joëlle MULLER**, **Anna DUPÉCHAUD**, **Hélène MAZZÉGA**, libroj de **Richard VALET**, komputila prezentado de la belega libro pri strangaj objektoj, verkita de **Sylvain LELARGE**, por instrui la francan lingvon al Nederlandanoj. Multaj partoprenantoj babilis kun la artistoj kaj aĉetis artaĵojn.

La sabatan vesperon, post bona vespermanĝo, la koncerto de

**Guillaume ARMIDE** ricevis varmajn aplaŭdojn kaj bisojn. Ĝis noktomezo daŭris la "verdaj" babiladoj en la ferieja kafejo antaŭ glaso da biero aŭ cidro.

Dimanĉon, frumatene, rekomenciĝis la 4 diversaj atelieroj por ebligi grandan promenadon je la 11a horo: dum du horoj oni malstreĉis la muskolojn ĉu piedirante al la marbordo de *Stella*, ĉu vizitante la urbon *Le Touquet* kaj ties famajn hotelojn.

Post tradicia komuna fotado kun vizito de loka ĵurnalistino, ĉiuj aprezis la tagmanĝon dum oni tute ne krokodilis!

La dimanĉa posttagmezo estis dediĉita al la celebrado de la jubileo. **Jean DIETRICH**, la iniciatinto de la Eŭropa Rendezvo kun **Richard** kaj **France VALET** rakontis pri la historia evoluo de la aranĝo.

Nia entuziasmplena prezidanto **Michel DECHY** rakontis pri la traduko al Esperanto de la bildstrioj de Tinĉjo kaj prezentis la ĵus aperintan: **La templo de l' Suno**.

**Flory WITDOEKT**, kiun **Edmond** prezentis kiel la floron de nia movado, parolis pri sia projekto aperigi *DVD*-on por la Eŭropa Unio kun naciaj himnoj, kiujn kronos nia Eŭropa Esperanto-himno.

Ŝi sukcesis kantigi tiun himnon al koruso de profesiuloj, kiun ni spektis per *DVD*-o.

**Katalin KOVÁTS**, la lumturo de nia aranĝo, brile prezentis la novan ludon **RISKO**, kiun ŝi kreis sur [Edukado.net](http://Edukado.net) por instigi nin daŭre kleriĝi pri la Esperanta kulturo. Ŝi tre lerte ludigis 6 partoprenantojn por klarigi la regularon, mi devus kalkuli la poentojn, **Edmond** gajnis. Ne, mi ne friponis por doni al li favoran rezulton, tion mi juras!

En Francio, ĉio finiĝas per kanzonoj: la 23 kantistoj kaj Franjo, iom timantaj pro impresi esti forgesintaj la lernitajn kantojn, gaje kaj sufiĉe bele kantis antaŭ la cetero de la publiko. Varmajn aplaŭdojn, okulojn plenajn de ĝojo, kortuŝajn vortojn, denove multajn amikecajn rilatojn ni spertis. Jam ni cerbumas pri la venonta Rendezvo kaj nun restas en nia kapo la melodio de la lernitaj kanzonoj.



Dankon al ĉiuj animantoj, viaj donacetoj ankoraŭ ne alvenis. Pro la ŝanĝo de nia poŝtadreso, la pakajo reiris al la sendinto! Ni ne malesperu!

Arlette kaj Edmond **PLUTNIAK**

Jen atestoj de kelkaj partoprenintoj, kiuj rakontas siajn impresojn:

Mi partoprenis la atelieron pri korusa kantado. Ĉeestis 23 personoj: 16 virinoj kaj 7 viroj. Estis plezure konstati la ekvilibron en la diversaj pupitroj: 3 tenoroj, 3 basoj, 9 sopranoj kaj 7 aldooj. Franjo elektis por ni 7 kantojn, ampleksa programo!

Post la unua ĉen-kanto, kiu lernigis al ni ankaŭ bone kalkuli: 3 kaj 3 kaj 3 jen 9, ni tuj konsciis, ke ni atingos kontentigan harmonion en 3 aŭ 4 voĉoj. Franjo tre kompetentis por gvidi nian grupon de komencantoj kun taŭga aŭtoritato sed kun bona humoro. La unuan posttagmezon ni sukcesis kanti kvarvoĉe 5 nekonatajn kanzonojn. Kia plezuro estis kanti kune! Ni nin demandis ĉu ni rememorigos ĉiujn el la lernitaj kantoj. "Ne timu – diris al ni Franjo –, morgaŭ estos granda miksajo!! Estas normala fenomeno..." La sekvantan matenon, ekde la 8a horo, (Jes, oni vekigis frumatene en *Stella!*), per voĉoj ankoraŭ dormantaj, ni lernis kanti la Eŭropan himnon kvarvoĉe en bela harmonio. Ni ne tre bone rememoris la kantojn de la antaŭa tago, sed iom post iom la diversaj harmonioj revenis en la kapon.

Je la 11a horo jam alvenis la fino de nia ateliero; ni aplaudis nian ĥor-estrinon kaj kore dankis ŝin; eĉ se ni ne atingis artan nivelon, ni havis

grandan plezuron kune kanti. "Via nivelo pli boniĝos venontjare", diris Franjo. Tuj ni notis la daton de la venontjara Rendevuo en *Stella-Plage*: la 15an-16an de Novembro 2014!

Arlette **PLUTNIAK**

Anne **JAUSIONS**, kun siaj ĉarmo, talento kaj klereco, malkovrigis al ni la mirindan mondon de niaj nuntempaj verkistoj. Ŝi vere donis al ni la emon legi kaj relegi la verkojn de nia nuntempa literaturo. Tiel ĉi-vintre mi frandos la ĉef-verkon de Eugène **DE ZILAH**: "La Princo de la Hunoj".

Dank' al ĉiutaga legado, mi povos eĉ iĝi verda sumuo! Ĉu ankaŭ vi emus sumuo-iĝi? Vidu tiun ligon, kiu klarigas la regularon:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

**Richard VALET**, kiu de jaroj verkas la ege interesajn tekstojn por la komencantoj, mirinde verkas ankaŭ romanojn en la franca lingvo; li majstre prezentis al ni siajn kvar aperintajn librojn. Mi nepre konsilas ilian aĉetadon kaj legadon.

Edmond **PLUTNIAK**

**Michel DECHY**, dum sia kurso, laborigis nin helpe de la albumo "Tinĉjo en Tibeto"; ĝi estas la dudeka albumo el dudek kvar albumoj, kiujn verkis **HERGÉ**. Tiu estas verŝajne la plej bona el ĉiuj. **Michel DECHY** montris al ni la horizontalan, grandan dimension, kaj la vertikalan, spiritan dimension de la rakonto. Ĉiam estas interese legi aŭ relegi tiun rakonton. Oni deziras plu legi por malkovri la sekvon kaj amuziĝas pri la misaventuroj de kapitano **HADDOCK**.

Dank' al **Michel DECHY**, tiu albumo iĝas vivanta ilo por lerni Esperanton. Tra tiu laboro Esperanto ne plu estas sonĝo sed realaĵo, "Mil miliardoj da fulmotondroj"!!

Daniel **CALVOS** (Araso)

## ENHAVO

### ASOCIAJ TEMOJ

Fede ★ 25-a Jubilea Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage	p1
Fede ★ Komitatkunsido de UFE en la "Ĉerizejo"	p6
Fede ★ Lille2015 Ek al la centa!	p7
E080 ★ Eksterordinara Ĝenerala Membrokunveno	p7
ArE ★ Agad-raporto el Araso	p8
DuE ★ Agad-raporto el Dunkirko	p8
LVE ★ Agadraporto el LVE	p9
LVE ★ Vizito de Ĝoja	p9
VaE ★ Agad-raporto el Valencieno	p10

Mi ŝatis la kurson de **Michel DECHY** pri Tinĉjo. Mi lernis multe da anekdotoj pri tiuj bildstrioj kaj la dokumentoj preparitaj de **Michel** enhavis bonajn vortprovizojn.

Ankaŭ dum la Jubilea prezentado mi malkovris interesajn faktojn.

Mi ankaŭ ĝuis la viglan promenadon al la strando.

Mi dankas la organizintojn pro tiu bela renkontiĝo. Sed mi opinias, ke la matenmanĝo dimanĉon matene je la 7a estis tro frua. Je la 8a, ne estis multe da partoprenantoj en la klasĉambro...

Didier **TOULLER** (Araso)

Kia granda plezuro estis por mi partopreni la kurson de Franjo **LÉVÉQUE**, kiu estas bonega ĥor-estrino!

En kelkaj horoj, ŝi sukcesis kantigi al ni kvarvoĉe kvin kantojn en la Esperanta lingvo!

Chantal **WLODARSKI** (Araso)


Mia dua Eŭropa Rendevuo en *Stella-Maris*.

Post unu horo kaj duono da veturado, fojfoje en la nebulo, mi forlasis mian aŭton sur la parkejo. Okazas la 25a Eŭropa Rendevuo en *Stella-Plage*, mia dua. Mi prenis



**Stella Maris**  
VILLAGE VACANCES  
CAP FRANCE  
Repas  
Séjour - Chambres  
Réunion Famille  
Séminaire  
Banquet - Réception  
03 21 94 73 65  
←

**La 25-a  
Eŭropa  
Rendevuo**



la ŝlosilon, metis miajn bagaĝojn en la dormoĉambbron, alkrōcis mian brustoŝildeton, zorgante ĉi-foje ne vundi min (mi ne estas tre lerta kun tiaj aĵoj, ofte la pinto de la pinglo penetras en mian karnon, ne en la fermilon!). Mi salutis la aliajn konatajn partoprenantojn, babilis iomete, vagis ĉirkaŭ la stablo de la libroservo, aĉetis kelkajn novajn romanojn... Kaj la evento oficiale komenciĝis. *Arlette*, *Edmond* kaj *Katalin KOVÁTS* disdonis la atestilojn de la KER-Ekzamenoj al la sukcesintoj. Pasintjare, freŝbakita esperantisto spektante tian scenon, mi pensis, ke tre plaĉus ankaŭ al mi ricevi diploman atestilon. Ĉi-jare, unu el la atestiloj estis por mi, la pasintjara revo konkretiĝis. Plia pruvo, ke Esperanto estas lingvo rapide scipovebla. Do *Katalin* enmanigis al mi mian KER-atestilon – granda plezuro. Tiam mi pensis pri la speciala Esperanta etoso, kiu ebligas tiom da mirindaj aferoj... Ĉu en aliaj lingvoj aŭ fakoj ekzistas aktivuloj, kiuj kapablas organizi tutmondan diploman sesion, malgraŭ la multaj komplikajoj kaj la malsamaj horoj? Ĉu ekster Esperantujo oni ricevas sian diploman atestilon de akademiano? Vidante la plezuron de la sukcesintoj, post la foto, *Katalin* decidis repreni la atestilojn por denove disdoni ilin vespere. Jes, indas sperti tian ĝuon du fojojn! Do ŝi pretekstis, ke ŝi devos aldoni sian subskribon.

Komenciĝis mia elektita ateliero pri literaturo, estrata de *Anne JAUSION*, sperta fakulino, kiu legis milojn da libroj kaj relegis ilin plurfoje por senti la subtilaĵojn. Ŝi kunprenis kartonskatolojn plenajn de libroj, kaj ŝi preparis eltiraĵojn de bonegaj verkoj. Ni parolis pri famaj verkistoj, gravaj romanoj. La partoprenantoj legis unu post la alia frazojn de la eltiraĵoj.

Tiam mi komprenis, ke mi devos ĉesigi mian hejman franclingvan legadon. Ekzistas tiom da gravaj Esperantaj verkoj, ke mi bezonos pli da tempo por legi ilin.

Dum la paŭzo, mi tuj iris renkonti *Michel DECHY* por aĉeti la du volumojn de *Tinĉjo*, kaj la libreton, kiu prezentas kiel uzi bildstriojn en instruado.



Post la dua parto de la atelieroj, ni vespermanĝis en la manĝejo de *Stella-Maris*. Plia afero pri kiu oni zorgas en Esperantujo: oni scias, kiu estas vegetarano ĉar la aliĝilo ebligas menci tiun informon. Malofte aliloke oni zorgas pri tio. Do ni, vegetaranoj, kune manĝis kaj la kuiristo adaptis la manĝaĵojn. Ne estis facile por la kelnero kalkuli, kiu estas vegetarano, vegano, okaza vegetarano, vegetarano kiu manĝas fiŝaĵojn, sed ne ovojn aŭ ovojn sed ne fiŝaĵojn ktp. kaj la kelnero preskaŭ sukcesis meti la taŭgajn pladojn antaŭ la malsatuloj. Ĉiuj bone ricevis, escepte *Guillaume ARMIDE*, la kantisto de la vespera spektaklo. Ve... tiam la kunestantoj demandis sin, ĉu li ricevos sufiĉe da nutraĵoj por bone kanti... sed la tuj okazonta spektaklo trankviligos nin. Ni ĉiuj ĝuis liajn kanzonojn akompanitajn per piano. *Guillaume* ankaŭ donis al la spektantaro la adreson de sia retpaĝaro, en kiu liaj kanzonoj estas senpage aŭskulteblaj, elŝuteblaj, disdoneblaj ktp. Alia aparteco de Esperanto: la dispartigemo.

Ĉu ne-esperantistaj artistoj proponus tion okaze de siaj koncertoj? Eble ili forgesas proponi... Indus sciigi al ili tion: "He! Ni amas vian muzikon sed vi forgesis diri kiel senpage aŭskulti – kaj disdoni al ĉiuj – vian muzikon!" Kion ili respondus? Eble ili ekkrius "Piratoj estas mortigendaj!!!". Kompreneble oni devas provi subteni tian belan econ. Tiel *Guillaume ARMIDE* povos ankoraŭ verki kanzonojn, registri ilin kaj produkti venontajn albumojn. Post la spektaklo, *Katalin* denove disdonis la atestilojn – granda plezuro. Kaj estis tempo enliĝi.

Post frua bongusta matenmanĝo, okazis la dua parto de la atelieroj. Ni plu studadis la nunan literaturon.

Antaŭ ol tagmanĝi ni elektis inter ĉu paŝadi ĝis la strando, ĉu viziti la najbaran urbon *Le Touquet* aŭ ĉu resti babili en la salono. Mi babilis tie. La skipo de la manĝejo estis preta ricevi la komplikajn homojn, kiuj havas strangajn dietojn.

Posttagmeze, *Flory WITDOECKT* prezentis sian filmon pri la ĥoro, kiu kantas Esperante la Eŭropan himnon, kaj informis poste pri sia projekto eldoni DVD-on. *Michel DECHY* prezentis la historion de la eldono de la du bildstrioj "Tinĉjo". *Katalin* eksplikis la regulojn de la kultura ludo RISKO uzebla en la retejo [Edukado.net](http://Edukado.net). Kaj ni spektis spektaklon de la Esperanta ĥoro (estrata de Franjo *LÉVÉQUE*). La antaŭan tagon, antaŭ la komenco de la kantateliero, la partoprenantoj tute ne scipovis la kantojn. Ses horojn poste ili estis anoj de profesie kvalita ĥoro. Mirinde, ĉu ne? Kiel mi menciis supre, en Esperanto oni tre rapide progresas. Eblas en ses horoj transformi homon, kiu dum sia tuta vivo neniam kantis, al profesia kantisto, Kondiĉe, ke li kantu Esperante. Kompreneble, homoj kiuj lernas kanti uzante aliajn lingvojn bezonas plurajn jarojn da trejnado. Perfekta kaj granda spektaklo, eĉ se la estrino kelkfoje ordonis rekomenci. Ŝi havas absolutajn orelojn kaj deziris perfektajn sonojn.

Tiel finiĝis la 25a *Stella-Rendevuo*, grava evento perfekte organizita, danke al la grandega laboro de *Arlette* kaj *Edmond*.

Eble la kutima demando: ĉu mi krokodilis? Mi konfesas, nur iomete kom aliaj Arasanoj (mi ne diros iliajn nomojn...), sed neniam dum vespermanĝo, tagmanĝo, en la dormoĉambro, do finfine ne multe. Surprizis min, kiam la voĉo de *Anne JAUSIONS* sonorigis francajn vortojn! En la necesejo, super la lavkuvo, ŝi baraktis kun la regilo de la krano kaj fine ekkriis: "Mais c'est froid!", verŝajne estis ŝia sola franca frazo dum la du tagoj!

*Fabrice LEMAIRE* (Araso)

## KOMITATKUNSIDO DE UFE

### de la 20-a de Oktobro en la “La Ĉerizejo”

Okazis, la 20-an de Oktobro 2013 en la Pariza sidejo de UFE, kunsido de ties komitato.

El nia Norda federacio partoprenis: *Xavier DEWIDHEM* kaj *Julia HEDOUX*, ambaŭ estraranoj de UFE, kaj *Claude LONGUE-ÉPÉE* reprezentanto de nia federacio. *Xavier* prezidis la kunvenon. *Michel DECHY*, reprezentanto de *GEE*, ne povis partopreni, sed li rajtigis *Xavier* por voĉdoni je lia nomo.

El ampleksega tagordo mi volas resume paroli ĉi-sube nur pri diversaj pridebatitaj punktoj aparte interesantaj aŭ koncernantaj nian federacion.

#### Reviziado de nia interna regularo

Estas ĉefe pritraktitaj kaj precizigitaj la rilatoj de **UFE** kun la kunlaborantaj asocioj, havantaj kontrakton kun **UFE** kaj reprezentanton en ĝia komitato: regionaj (kiel Norda federacio); specifaj (kiel **FKEA**); integriĝintaj (**JEFO** kaj *GEE*, specifaj sed zorgantaj ĉefe pri Esperanto kaj intime ligitaj al **UFE**).

La rearanĝita interna regularo estas redaktota kaj prezentota de *Xavier* okaze de nia komitata kunsido de *Stella-Maris*.

La problemo de eventuala komuna aliĝkotizo “UFE – Regiona federacio – Loka grupo”, kiu estis jam prezentita en nia gazeto, ne plu estas aktuala.

Ĝi finfine prezentigis far **UFE** tiel:

75 € al **UFE**, kiu dispartigas inter

Federacio 10 % = 7,5 €

Klubo 30 % = 22,5 €

**UFE** 60 % = 45 €.

Ĝi ja ebligus pli altan rabaton de impostoj kaj tiel celus pligrandigi la membraron. Sed ĝi ne solvas la tutan problemon de la regionaj kaj lokaj kotizaj sumoj; kaj laŭ la nuna enketo ĝi ne estus alprenita de ĉiuj federacioj kaj grupoj.

#### Jara raporto 2012-2013

Ĝi estas sendota al **UFE**, de la prezidanto kaj sekretario de niaj

federacioj, antaŭ la 6-a de Aprilo 2014, se eble en Februaro.

#### Membraro de UFE

Ĝi maltrankvilige malkreskis inter la jaroj 2009-2010 kaj 2013 de 738 ĝis 545 membroj!...

Ĉu komuna aliĝkotizo, menciita ĉi-supre, povus fakte sufiĉi por allogi federacianojn aliĝi al **UFE** dank’ al imposta avantaĝo (kaj reciproke!)?...

#### Nova tarifo por LME

Estis decidita akcepta tarifo je 8€ anstataŭ 18 €; sed nur por nova abonanto kaj nur por unu jaro.

La rezulto estas sufiĉe kontentiga, kaj la principo estos daŭrigata.

#### Esperanto “au Bac”

Inter la patronoj de la peticio, difinitaj je la lanĉo de la afero, *Albert JACQUARD* forpasis; sed restas *Henriette WALTER*.

Estis pli ol 30 000 subskriboj kolektitaj. Nun la respondeca skipo estas respondanta al demandoj starigitaj de la ministro.

Ĝi zorgas pri kreado de gazetara ataseo.

#### Ĝemelaj urboj.

En la **UFE**-komitato *Raymonde COQUISARD* estas taskita pri ĝemelaj urboj.

Ŝin ni kontaktu pri tio, se estas solvota eventuala problemo.

#### Landa kongreso de 2014

El du kandidatoj (*Chambéry* por la Rodanalpa federacio kaj *Marseille* por la Provenca federacio) nur *Chambéry* nun kapablas prezenti tre kompletan dosieron.

La kongreso povos okazi en *Chambéry* de Vendredo 30-a de Majo ĝis Lundo 2-a de Junio (post la festo de la Ĉieliro).

Estos ekskursoj: Lago de *Bourget*, vizito de *Chambéry*, piedmigrado sur monto apud *Chambéry*.

#### Universala Kongreso “Lille2015”

*Xavier* kaj *Julia* jam bone laboris pri la afero. Vidu en ĉi-tiu kaj venontaj numeroj de la **Norda Gazeto** la

raportojn de *Xavier* pri la aktualigita situacio de la organizado.

Estos specifa kroma konto surbaze de budĝeto prezentota en Januaro. Sed de nun **UFE** dediĉas 1000€ por diversaj repagoj.

Inter la legantoj de nia gazeto estos verŝajne interesatoj, por esti ĉiĉeronoj aŭ tradukantoj de profesiaj gvidistoj, por gvidi ekskursojn (aŭ por sindoni al diversaj helpoj). Ili sin konatigu...

La ekskursoj estos baldaŭ difinitaj de la Turisma Oficejo de Lillo, kun la partopreno de niaj responsuloj.

Por tiuj ekskursoj estos organizitaj: staĝoj aparte por trejni tiujn ĉiĉeronojn; kaj kunvenoj de ĉi-tiuj kun la profesiaj gvidistoj de la ekskursoj.

#### Ekzamenoj de FEI

FEI decidis, ke: ekde nun eblos trapasi iun nivelon (inkluzive de kapableco), ne trapasinte la antaŭa(j)n nivelo(j)n.

#### Eksteraj Rilatoj

##### Gazetara komunikado

Estu iu reprezentanto en ĉiu federacio por rilati kun la gazetoj kaj sendi komunikajojn al ĉi-tiuj.

Estas dezirinde, ke tiu delegito havu ankaŭ rilatojn kun la politikistoj (parlamentanoj, deputitoj, kandidatoj al diversaj balotoj, ktp.).

Eventualaj kandidatoj inter la legantaro de la Norda Gazeto sin konatigu.

#### Eldonaĵoj. Tinĉjo.

La **UFE**-kasisto *Sébastien MONTAGNE* rilatos senpere kun *Michel DECHY*, por solvi la problemojn de la vendokosto de la albumoj kaj de ilia stokado (nun ĉe iu familiano de *Michel*).

Resumis kaj komentis:  
*Claude LONGUE-ÉPÉE*

Lille2015

## Ek al la centa!

LILLE2015  
esperanto



Supre: Lille Grand Palais

Maldekstre:  
Lille Grand Place

Dekstre:  
Urbo-domo de Lillo



En 1905, la unua Universala Kongreso de Esperanto (UK) okazis en la nordfranca havenurbo Bulonjo-ĉe-Mar. De la 25a de Julio ĝis la 1a de Aŭgusto 2015, la centa UK okazos en la nordfranca ĉefurbo: Lillo (*Lille*)!

Universala Esperanto-Asocio (UEA) decidis la urbon Lillo en Marto 2013. Post tiam, la Landa Estraro de *Espéranto-France* havas vicprezidenton pri la UK "Lille2015", nome *Xavier DEWIDHEM*, kiun helpas *Julia HÉDOUX* kaj *Michel DECHY*. En

Septembro, la konstanta kongresa sekretario de UEA, *Clay MAGALHÃES*, revizitis Lillon por labori kun la trio de "Lille2015". Komence de Decembro kunsidos kunlaborantoj por konsistigi la Landan Kongresan Komitaton (LKK).

La centa UK disvolviĝos en la vasta kongresejo *Lille Grand Palais* proksime al la urbocentro. Ekskursoj varios inter historio kaj tipeco, tra kaj ekster la Lilla regiono, kaj kompreneble aparte en Bulonjo-ĉe-Mar. Prilaborotaj estas i.a. kultura kaj spektakla programo, infana

kongreseto kaj junulara programo. Vi povas informiĝi pri la centa UK kaj sekvi la novaĵojn vizitante la retejon: [www.lille2015.fr](http://www.lille2015.fr) la Facebook-paĝon: [www.facebook.com/lille2015](https://www.facebook.com/lille2015) Jam ĉirkaŭ 250 homoj ŝatas kaj abonas la Facebook-paĝon: ankaŭ vi ŝatu!

Vi povas rilati kun la organizanta trio por informo, ideo aŭ kontribuo retpoŝte: [lille2015@lille2015.fr](mailto:lille2015@lille2015.fr)

Redaktis *Xavier DEWIDHEM*

## El Amieno

# Eksterordinara Ĝenerala Membrokunveno

Tiu membrokunveno por la 2013-2014 jaro-periodo okazis la 6-an de Decembro 2013 vespere, en la ĉambro "Les Aubretias" en Salŭelo. Post bongusta komunuma manĝo okazis la Eksterordinara Ĝenerala Membrokunveno. La ĉefa demando dum la membro-

kunveno estis la subskribo de la novaj statutoj fakte jam balotitaj en Decembro 2012 de la membroj. Pro diversaj personaj kialoj, la dokumentoj ne estis ĝustatempe senditaj al la sekretario pri asocioj de la prefektejo de la *Somme* kaj konsekvence la oficialaj decidoj de la membro-

kunveno 2012 ne estis agnoskitaj. La decidoj fakte intertempe ne ŝanĝiĝis. La statutoj estas samaj. Kun-Prezidantoj plu kun-prezidas. Tamen, la posteno de la Kasisto ŝanĝiĝas (*J.-L. GRÉAU* anstataŭas *D. DEVIS*) kaj plu mankas malmultaj subskriboj ktp.

Amienanoj devas loke agi kaj fari ĉion eblan por fini la transiron al nova prezidanteco.

La sendo devu fariĝi antaŭ la 6-an de Marto 2013. Tiu dato estas 3-monata post la dato de la membrokunveno, kiu estas la leĝa tempo-periodo por oficialigi la decidojn.

Tion la Asembleo konscias.

*Cyrille DÉCOUTURE*, por instigi al vera fino de la proceduro al la komunuma Prezidanteco, sendos ekxiĝ-leteron al la prefektejo.

La Eksterordinara Ĝenerala Membrokunveno finiĝis per prezento de


Esperanto-Sumoo (pri tio vidu la tekston de *E. PLUTNIAK* je la paĝo 3-a), speкто de retaj filmetoj pri Esperanto kaj diskutoj.


Redaktis *Cyrille DÉCOUTURE*

## El Araso


### Agad-raporto el Araso


 **Lundon la 16-an de Septembro 2013** ĉe la Arasa Kultur-Oficejo kunvenis dudek lokaj esperantistoj en nia kutima kursejo. Ni longe babilis pri la enhavo de la okazontaj kursoj kaj pri la ekzamenoj. Iuj proponis, aliaj rebatis, kaj ĉiuj argumentis. Kiam elĉerpiĝis la salivo, ni komencis solvi lingvan ekzercon, sed laboris nur kelkajn minutojn, ĉar nia prezidanto *Jacky RAMON* kaj nia sekretarino *Jeanine RAULT* baldaŭ elsakigis ne nur malplenaĵn glasojn kaj telerojn, sed ankaŭ plenajn botelojn kaj rondajn tortojn...

 **La postan semajnfino** kelkaj asocioj deĵoris ĉe nia Esperanto-budo okaze de la Arasa asoci-forumo, kaj unu vizitantino decidis eklerni Esperanton en nia klubo.

 **Sabaton la 16-an kaj dimanĉon la 17-an de Novembro** pluraj el niaj asocioj partoprenis en *Stella-Plage* la 25-an Eŭropan Rendevuon, organizitan de nia vickasistino *Arlette PLUTNIAK* kaj de nia eksprezidanto *Edmond PLUTNIAK*.

Se la organizintoj sukcesis redakti prian raporton pere de sia kelkfoje kaprica komputilo, kaj se paneis neniu el la komputiloj de la ĉefredaktoro, de la korektisto, de la engaĝigisto, kaj de la presisto de la Norda Gazeto, mi konsilas al vi legi ĝin.

 **Ĝis la 18-a de Novembro** instruis laŭvice en Araso *Arlette PLUTNIAK*, *Edmond PLUTNIAK*, *Marianne DUNLOP*, kaj *Jean HENNEBERT*. Se vi deziras ekscii, kiu instruis post tiu dato, bonvolu post kelkaj monatoj tralegi la Gazeton de Junio 2014.

 **Sabaton la 23-an de Novembro**, kadre de la evento "*Arras Solidarité Internationale*", dudek lokaj asocioj (inter kiuj *Arras-Espéranto* danke al la klopodoj de *Marianne DUNLOP*) prezentis sian agadon en salono de la Arasa belfrido.

**Nia retejo:**

<http://arras.esperanto-nord.org>

**Nia adreso:**

**Office Culturel**

61 Grand'Place

62000 ARRAS.


**Esperanto-kursoj**


lundne de la 18-a ĝis la 20-a (krom dum ferioj).


Raportis *Jean HENNEBERT*

## El Dunkirko


### Agad-raporto el Dunkirko


 **Merkredon la 25an de Septembro** rekomenciĝis la Esperanto-kursoj (dufoje monate) por kvin progresantoj (0 komencanto).

 **La 16an de Novembro**, *Xavier VILAIN* partoprenis en la kunveno de la Federacia Komitato (*Esperanto-Nord*), en *Stella-Plage*.


 **La 16an kaj 17an de Novembro**, unu klubano (*Xavier*) partoprenis en la 25a

Eŭropa Rendevuo de *Stella-Plage*.

 **Merkredon la 18an de Decembro**, la klubanoj kune vespermanĝis en restoracio – en Dunkirko – okaze de la tradicia Zamenhof-festo.

 **Sabaton la 22an de Marto 2014**, nia asocio *Dunkerque-Espéranto* starigos budon en la 10a Salono pri la Lingvoj en la interurba komunumdomo de Dunkirko, propon-

ita de la asocio "*Association pour le développement des langues sur le littoral dunkerquois*" (*ADLLD*). Ĉirkaŭ 1500 vizitantoj povos ekkoni la agadojn de la klubo.

 **Merkredon la 25an de Junio 2014** okazos la 22-a ĝenerala membrokunveno de nia asocio, en la kutima kunvenejo "*Brossolette*".

Raportis *Élise DEPLA*



## El Lille-Villeneuve-Esperanto &gt; METROPOLO

## Agad-raporto el LVE

★<sup>64</sup> Ĉiumonataj renkontoj

Ĉiun trian jaŭdon de la monato (krom en Julio kaj Aŭgusto) je la 18h.30 en la Tenisa Klubo **FOS** en *Villeneuve d'Ascq*.

★<sup>65</sup> Ĉiusemajnaj Kursoj

*Bersée*: ĉiun lundon de la 18-a h.30 ĝis la 20-a h.00, supera kurso por 5 geprogresantoj, kiuj eklernis lastajn jarojn; kaj marde je la sama horo por 2 gekomencantoj. [Instruisto *Claude LONGUE-ÉPÉE*].

Lillo: ĉiun mardon, en la Kvartala Domo en la centro de Lillo, post kelkaj semajnoj, je la sama horo por komencantoj (ĉirkaŭ 2 lernantoj); konversacia rondo dufoje monate en la hejmo de Katja (ĉirkaŭ 4 gepraktikantoj), [Katja **BOEN**].

*Oignies*: konversacia rondo marde, (ĉirkaŭ 3 progresantoj); [*Richard SLATSCHKY*]

Universitato Lillo III: ĉiun mardon, je la sama horo por gekomencantoj kaj gekomencintoj (ĉirkaŭ 8); kaj ekde Novembro dufoje monate je la sama horo lunde por geprogresantoj. [*Michel DECHY*].

★<sup>66</sup> Someraj Staĝoj

De la 8-a ĝis la 12-a de Julio, de la 18-a h.30 ĝis la 20-a h.00 : 5 seancoj por malkovri la lingvon. (3) Same de la 26-a ĝis la 30-a de Aŭgusto (1), [*M. DECHY*]. Poste, du

lernantoj daŭrigas la lernadon dumjare en la Universitato de Lillo.

★<sup>67</sup> Universitato pri Libera Tempo

Minimume 10 fojojn vendrede matene, dum 1h. kaj 30 por komencantoj kaj sekve por progresantoj (ĉirkaŭ 2 + ĉirkaŭ 3). [*M. DECHY*].

★<sup>68</sup> La klubo ĉe Interreto [www.lve-esperanto.org](http://www.lve-esperanto.org)

Multaj informoj pri la diversaj agadoj de nia klubo aperas en tiu bonega informilo.

Sufiĉe ofte homoj kaj ĵurnalistoj kontaktas nin post vizito de tiu "fama" adreso kies zorgantoj estas *Katja BOEN* kaj *Xavier DEWIDEHEM*.

★<sup>69</sup> Prelegoj kaj prezentado de la lingvo Esperanto

Ĉiujare la elementaj lernejoj (*Anatole FRANCE* kaj *Pablo PICASSO*) invitas min. Mi kutime proponas 3 seancojn po 1h kaj 30 (prezentado de Esperanto, kurso pri matematiko en Eo kaj fine ankaŭ japana Sorobano en Esperanto). La unua leciono en lernejo *Anatole FRANCE* okazis la 8-an de Oktobro.

La 2-an de Oktobro en Liceo "*Marguerite DE FLANDRE*", en *Gondcourt*, mi estis invitita de instruistino pri historio en "lasta klaso" dum 2 horoj por prezenti Esperanton. [*M. DECHY*].

La 28-an de Novembro, ĉina ĵurnalistino prelegos en la **MRES** pri Ĉinio. Kiel kutime ni poste manĝos kune en apuda restoracio.

La 21an de Novembro mi denove prelegis en la urbeto "*Mouvoux*", invitite de la asocio "*Nord Madame*" (Asocio nur por virinoj en diversaj urboj de la norda regiono). Kia plezuro havi tiom da virinaj oreloj, kiuj aŭskultas min! [*M. DECHY*]

★<sup>70</sup> Budoj okaze de diversaj aranĝoj

Foiro pri Asocioj: ĝi okazis la 8an de Septembro en la vastega sporthalo "*Palacium*" en *Villeneuve d'Ascq*, de la 10-a ĝis la 18-a, bonega momento por reklami kaj varbi! [deĵoris *Xavier DEWIDEHEM*, *Vincent PEIGNIEZ* kaj *Michel DECHY*]

Festivalo pri la Bildstrioj en *Lys-les-Lannoy*: la 9-an kaj la 10-an de Novembro 2014. [*M. DECHY*]

Dankon al ĉiuj deĵorontoj kaj vizitontoj!

★<sup>71</sup> Lille2015, Universala Kongreso okazos en Lillo

Vizito, de la 11-a ĝis la 13-a de Oktobro, de *Clay MAGALHES*, la responsulo pri U-K-oj ĉe UEA, kiun renkontis *Xavier DEWIDEHEM*, *Michel DECHY* kaj *Julia HEDOUX*.

Raportis *Michel DECHY*

## Vizito de Ĝoja

Dum du semajnoj, *ZHANG Ping* (Esperanta kromnomo: Ĝoja), ĵurnalistino ĉe Ĉina Radio Internacia por la Esperanta rubriko (<http://esperanto.cri.cn>) prelegvojaĝis en Francio. La klubo de *Lille-Villeneuve-Espéranto* estis unu el la elektitaj kluboj, kiuj bonŝancis gastigi ŝin!

Unua ekvido de Ĝoja apud la trajno: ĉarma rideto kaj pli da pezaj pakajoj

ol iu ajn alia prelegvojaĝanto iam kunportis (parto de la sekreto estas la multnombraj donacetoj disdonataj dum prelegoj kaj renkontiĝoj...).

La unua vespero estis trankvila, tamen laŭplane okazis ĉe ni gimnastiko (kiun ni kutime nomas ĉina gimnastika!). Kion faros Ĝoja? Mi kompreneble klarigis ke *Anna*, nia esperantista amikino kaj najbarino, gvidos la seancon en Esperanto, sed eble Ĝoja pli ŝatos ripozadi en sia ĉambro... Ne,

jen ŝi aperas en belega ruĝa *Taiji*-a vestaĵo kaj perfekte alprenas ĉiujn pozojn! Post nia kutima seanco, ŝi montras al ni kiel fari la *Taiji*-movojn kaj mem faras ilin sola dum kelkaj magiaj minutoj. Bona maniero reklami por Esperanto en nia malgranda grupo de amikinoj!

Jaŭdon matene, Ĝoja vizitis Lillo-n kun *Claude LONGUE-ÉPÉE* kaj kelkaj samideanoj (se vi deziras pli da

detaloj pri la vizito de Lillo kun **Claude LONGUE-ÉPÉE**, relegu la Nordan Gazeton kiu jam raportis pri ĝi, kaj provu ne maltrafi venontan viziton okaze de nova prelegvojaĝo).



*Claude prezentas plu prezentas, ĉi-foje al Ĝoja, la plej gravajn interesojn de Lille! :-)*

Atente aŭskultante la klarigojn de **Claude** kaj samtempe starigante multajn interesajn demandojn, Ĝoja sukcesas foti ĉiujn vidindaĵojn de la urbo (ŝi poste klarigos, ke dum tiu mateno ŝi faris pli ol kvincent fotojn!).



Kaj jen estas tempo veturi al **MRES** por la prelego de Ĝoja pri nuna Ĉinio. Ni ĉiuj estis iom elrevigitaj de la ne-alveno de ĵurnalistoj de *La Voix du Nord*. Estas nur korespondanto de tiu gazeto kiu, post ioma atendado,



komencas starigi kelkajn demandojn al Ĝoja, pri ŝia laboro, pri la redakcio de Ĉina Radio Internacia, la rilatoj inter la diversaj departementoj (pli ol sesdek, laŭ la diversaj lingvoj) pri ŝia parolibereco, kiam ŝi ion verkas aŭ diras dum elsendo.



Alvenas ĉirkaŭ dudek-kvin esperantistoj kaj Ĝoja komencas sian prelegon. Ŝi multe parolas pri la problemo de maljuniĝanta socio, kie

pli junaj paroj ankoraŭ kutimas zorgi pri la gepatroj hejme, sed kie la evoluo estas rapida. Per zorge elektitaj filmetoj kaj fotoj, ŝi mozaike konatigas al ni la vivon de siaj samlandanoj. Ni vidas junajn parojn kun infano, ili parolas al ni pri siaj deziroj, pri la estonteco.

Se mi rakontos, ke la vespero finiĝis en plej tipa Lilla restoracio, vi tuj divenos, ke mi parolas pri nia plej ŝatata *Djurdjura*-restoracio, kie la restoraciestro, kiel kutime, plej afable bonvenigas nin. Ni estas dek ses, kaj ĉiuj ĝuas la manĝadon kaj la samideanan estoson. Fine de la manĝo, Ĝoja intervjuas **Xavier DEWIDEHEM**, kiu parolas pri la Universala Kongreso *Lille2015* kaj varme invitas la ĉinajn esperantistojn multnombre aliĝi.


Vivo ne signifas nur feliĉaj okazaĵoj kaj vendredon matene Ĝoja akompanas nin al funebra ceremonio honore al **Lilli GILOTEAUX** kiu forpasis antaŭ kelkaj tagoj. Ŝia ĉeesto videble kortuŝas **Lucien GILOTEAUX** ĉar iusence ŝi reprezentas la tutmondan esperantistaron, kiu el ĉiuj landoj sendis al li kondolencojn.

Mallonga momento por viziti la belan muzeon *La Piscine*, kaj jam alvenas la tempo forveturi al la stacidomo, kaj survoje denove paroli pri venonta renkontiĝo kun Ĝoja: Ĉina Radio Internacia ja certe bezonos raportojn pri "*Lille2015*"!


Raportis **Katja BOEN**

## El Valenciano

# Agad-raporto el Valenciano

 **La kursoj en la Domo de Asocioj** de *Valenciennes* okazas:  
- 1a grado: ekde la 5a de Septembro, ĉiun jaŭdon de la 10a ĝis la 12a kun 3 gelnantoj; gvidanto **Jean MACKÉ**.  
- 2a grado: ekde la 5a de Oktobro,

ĉiun sabaton de la 10a ĝis la 12a kun 4 gelnantoj; gvidanto **Jean DIETRICH**.

 **La 16an kaj 17an de Novembro**, kvar membroj de *Valenciennes-Espéranto* partoprenis

en la 25a Eŭropa Rendevuo de "*Stella Maris*".

Raportas **Jean-Marc FRATARD**

## Rakonto de iu Finnlanda samideanino : Saliko

### ELMA



Somero. Senonda vastaĵo de la lago. Rondetaĵ arbarokovritaĵ insuloj. La akvo spegulas la verdajn alnojn kaj betulojn de la strando. Blanka remboato duonpuŝita en la akvo, duonkuŝanta sur la nefalĉita herbo. Mirinde blankaj kumulusoj kontraŭ la forta bluo de la ĉielo. Tra la malferma fenestro envenas gajaj infanvoĉoj de pli fora plaĝo. Odoras la somero kaj la lumo blindigas. Iu birdo pepas.

*Elma* sidas ĉe sia manĝotablo kun malplena kafotaso antaŭ si. Nur unu. Ŝi estas sola, soleca, de kelkaj jaroj. En sia aktiva aĝo ŝi estis tre okupita. Pro sia metio, akuŝistino, ŝi tiam sentis sin en la fokuso de la vivo. Oni konsultis ŝin, petis ŝiajn konsilojn, bezonis ŝian helpon en naskoj. Ŝi laboris en kliniko kaj unufoje ŝi helpis naskantinon en ties hejmo. Ĉiu nasko estis malsama kaj ĉiu naskiĝo estis miraklo, eĉ kiam nedezirita. Nur unu bebon ŝi kaj la naskantino perdis, kaj tio restas dolora punkto, kiun ŝia memoro ripete tuŝetas sed nun malpli ofte. Ŝi jam akceptis sian pasintecon.

Kun la kafo ŝi manĝis pecon da bonodora brileruĝa fragotorto. Per ĝi ŝi kelkfoje regalas sin somere. Kafumante ŝi rigarde sekvis du amuz-

ajn sciurojn, kiuj rondkuris sur pino-trunko, kvazaŭ ĉasante unu la alian. Supren kaj malsupren, rapide de branĉo al branĉo, kaj kaŝlode malantaŭ la trunkon. Diveneble ili nestas ie proksime. Ŝi ankaŭ aŭskultis birdajn pepadojn, sed interrompis ŝin ŝia telefono. Al ŝi estas malfacile stariĝi kaj preni la telefonon. La piedoj kaj manoj estas rigidaj, malrapidaj, nefidindaj. Iom da tempo daŭris antaŭ ol ŝi povis respondi. Ŝi scias, ke manipuli la telefonon jam estas problemeto, pro la malbona vido kaj la mallerto de la fingroj. Feliĉe ŝi nun sukcesis. Tio estis ŝia filino, kiu demandis, kiel ŝi fartas. Bone, ke la infanoj ne forgesas ŝin. Ŝi bezonas apogon, mensan kaj korpan.

Ĝuste antaŭ la fenestro jam maturiĝis la bluaj mirteloj. Kiu pluku ilin? Antaŭe ŝi mem rapide rikoltis unu aŭ du litrojn por si kaj la infanoj. Ŝia mirtelkuko estis frandinda kaj ĉiuj laŭdis ĝin. Sed nun, kiu pluku? Kaj kiu falĉu la tro longan herbon antaŭ la feriodometo? Kiu pluku la ruĝajn ribojn, kiuj jam brilas kiel juveloj sur la arbustoj? Kaj kiu puŝu la blankan boaton en la akvon kaj ekremu por iri fiŝkapti? *Elma* ne. Ne plu. Ŝi ne povas malsupreniri la kvin altajn ŝtonstup-

## ENHAVO

### ANIAJ MEMBROJ VERKANTAS

★ Elma	p11
★ Jean ZAY	p13
★ <i>Principiis obsta et finem respice</i>	p15
★ La telerbretaro (lasta parto)	p16
★ Almenaŭ 6 500 frenezuloj piedkuris trans "la Somme"!	p19
★ Sekretega sekreto	p21
★ La ĵurnalo de Cathy PERONI kaj kompanio (unua parto)	p22
★ Lilli GILTEAUX	p23
★ Atentigo de la redaktoro	p24

ojn, kiujn ŝi antaŭ kvardek jaroj kun Mateo faris en la kruta dekliveto inter la dometo kaj la strando por faciligi la malsupreniron.

Mateo? Longtempa kunulo, edzo forpasinta antaŭ kvin jaroj. Kara – kaj kelkfoje ĝena patro de ŝiaj du infanoj, amato de ŝia junaĝo. Ili havis siajn malsamopiniadojn, jes, sed Mateo estis forta viro kaj lia opinio ofte venkis. Nun tio ne plu gravas. *Elma* ne estas amara. Ŝi pli ofte memoras la bonajn tagojn. Per ferstango Mateo levis ŝtonegojn el la grundo, li ebenigis la herbejon, li senŝtonigis la strandon kaj el ses grandaj ŝtonegoj li faris la ŝtuparon laŭ kiu malsupreniri. Al ĉiaj praktikaj problemoj li trovis solvojn, ĉiujn laborilojn li lerte uzis. Li estis klopodema, elturniĝema. La suno rebrilis sur lia ŝvita bruna dorso, sub kies haŭto la muskoloj streĉiĝis kaj malstreĉiĝis. Laborante li fajfis aŭ zumetis dancmelodiojn de la tempo antaŭ ilia geedziĝo. Kiom larĝajn ŝultrojn li havis, kiom fortajn brakojn! Kaj malantaŭ la maldekstra ŝultro li havis brunan haŭtmakulon, kiun la okuloj de *Elma* ofte serĉis, ne malofte ankaŭ ŝiaj fingroj. Sur liaj amataj manoj estis kaloj. Sub la ungoj nigra tero, sed post la semajnfina saŭnumado Mateo estis pura, bonodora kaj glathaŭta ofte novlavita bebo. *Elma* memoras la lumajn somernoktojn, kiam ili kuŝis sen-dormaj sur la lito, sen kovrilo kaj

sen vestoj. Ŝi memoras la belon kaj ĝuon de la supraj junaj korpoj, la karesojn, kiuj dum jaroj pli lertiĝis. Du gefiloj fruktiĝis kaj donis al ili ĝojon kaj malĝojon. La vivo ne ĉiam facilis.



Kiam ili maljuniĝis, tenero kaj komprenemo iom anstataŭis pasiojn, sed daŭre estis bonege vivi kun Mateo. Post dudeko da jaroj ili ekhavis pli da tempo por si mem kaj por siaj ŝatokupoj, la fiŝkaptado, ĝardenumado, brikolado, legado kaj ankaŭ por nenionfarado. Ili ne plu hontis ripozi kaj maldiligenti. La infanoj ja plenkreskis, trovis sian propran vivon en urbo, la ŝtato ekpagis sufiĉan pension al ambaŭ gepatroj. Kiel bone!

Sed venis ŝanĝoj kaj malsanoj. Kial Mateo forpasis tiel frue? Nu, ŝi ja scias, ne plu eltenis lia koro. Okazis subita infarkto. Ĉu tio ne estus trafinta lin, se li ne tiom multe laborus kaj fumus? Sed en ilia junaĝo estis normale, ke viro ekfumus. Tiam oni ne parolis pri la riskoj. Fumado estis moda kaj plezura. Oni ankoraŭ ne sciis. Ankoraŭ nun fora odoreto de tabako povas vekti sopiron en ŝi.

Subite *Elma* aŭdas infanridojn kaj plonĝosonojn sur sia strandeto. Du petolaj geknaboj venis de la pli granda plaĝo kaj grimpis en ŝian boaton, remis iom pli foren de la strando kaj vice eksaltadis en la akvon por reenboatiĝi tuj? Ridoj, plaŭdoj, ŝpruc'! Ŝpruc' kaj plonĝ'! Kia ĝojego! Ĉu ŝi krii al ili ke ili ĉesu? Ke ili atentu la ŝtonojn sur la fundo? Ke estas danĝere? Ne, ŝi lasu ilin

amuziĝi. Nenio vere grava povas okazi. Kiel buntajn banvestojn ili havas! Kiel florojn en ŝia blanka boato, sur la blua lago. Kiam ŝi estis infano, ŝi banis sin nuda, kiel ĉiuj aliaj. Ŝia supra haŭto estis tute bruna. Kaj kiam ŝi estis junulino, ŝi banis sin nur kaŝe, ĉar banvestojn oni ne tiam havis. Tiam oni vidis la blankajn spurojn de la tagaj vestoj sur ŝia haŭto. Ili amuzis Mateon, kiam li la unuan fojon vidis. Per sia fingro li sekvis la limojn. *Elma* ankoraŭ memoras

la plezurojn de la junaĝo kaj pli frua infanaĝo. La tremoj de malvarmo. Elsalti de la boato, naĝi transen sub la boato, enboatiĝi, resalti, ŝpruciĝi la akvon, reteni la spiradon, rigardi, kiu povas plej longe resti sub la akvo.

Vizaĝo de la panjo en la fenestro de la dometo sur la deklivo. Tra la malfermita fenestro ŝvebas odoro de frititaj krespoj. Sur la kuireja tablo atendas alta stako da krespoj, sukeroj, kelkfoje ankaŭ fragokonfitaĵo, batita kremo aŭ glaciaĵo...

*Elma* rigardas en sian malplenan kafotason. Iom da nigra feĉo en ĝi. Ŝi ŝatas prepari sian kafon en la malnova maniero, sen aŭtomato kaj filtrilo. Apud la taso la piloloj. *Elma* kvazaŭ vekigaĵo eble ŝi tute ne povus paŝi. Ŝia voĉo mallaltiĝas, malaltiĝas, ŝi ekbalbutos. Ŝi ne sukcesos uzi la telefonon nek ŝalti la televidilon. Ĉiuj

ŝiaj agoj fariĝas malfacilaj, la movoj disskuitaj. Antaŭ tri jaroj oni konstatis en ŝi *Parkinson*-malsanon. Kiom longe ŝi kapablos elturniĝi kaj vivi sola? Nokte ŝi ofte maldormas kaj cerbumas, timas, demandas Dion kial, preĝas.

La infanoj de *Elma* aĉetis por ŝi marŝhelpilon nomatan "Rolatoro". Ŝi bezonas ĝin eĉ en la domo, de la manĝotablo al la kuirejo, de la lito al la necesejo, de la domo al la vendejo, kiu bonŝance situas nur tricent metrojn for. Multaj aferoj, kiujn ŝi antaŭe faris lerte kaj kvazaŭ aŭtomate, fariĝas preskaŭ ne fareblaj. Eta sulko en la tapiŝo, kaj ŝi apenaŭ povas movi la piedon trans ĝin. Sen la Rolatoro ŝi devas apogi sin je mebloj kaj muroj. Ŝi ne kapablas porti kaserolon aŭ kafopoton al la tablo; ŝi metas la ujojn kaj aĵojn sur la breton de la Rolatoro kaj tiel transportas ilin. Ŝi ja estas inventema kaj la loĝejo ne estas granda.



*Elma* scias, ke ŝi devas formeti ĉiujn tapiŝojn, sed ŝi tre ŝatas ilin. Ŝi mem teksis ilin, kiam ŝi ankoraŭ estis sana. Ĉiun koloron kaj strion en ili ŝi bone konas, ĉar ili estas faritaj el la eluzitaj vestaĵoj de la familio. En ili legeblas memoroj: la paliĝintaj laborĉemizoj de Mateo, ŝiaj propraj kotonaj roboj, blankaj littukoj, buntaj jupoj kaj bluzoj de la filino, bluaj ĝinsoj de la filo, nigraj kaj grizaj pantalonoj. Ĉiujn tiujn vestaĵojn ŝi tondis laŭ rubandoj por teksi tapiŝojn. Tia estis la reciklado de ŝiaj aktivaj jaroj. Ho, kiel malpeze ŝi paŝis sur la novaj tapiŝoj

tiam, plena de fiera ĝojo. Ĉiuj laŭdis ŝiajn teksaĵojn kaj ŝian elekton de koloroj. Kaj nun la tapiŝoj malhelpas ŝin, ĝenas ŝiajn paŝojn, ĝenas la Rolatoron. Jes, ŝi devos forvolvi ilin morgaŭ – se ŝi kapablos – aŭ peti helpanton.

lu frapas ĉe la pordo. Envenas najbarino. Brakumante *Elman* ŝi komencas laŭdi la ruĝajn pelargoniojn, kiujn ŝi

havas sur la teraso, kaj la belon de la vespero. Ili eliras kaj eksidas en la balancbenkon sur la teraso, nur por observi la malrapidan sunsubiron. Leviĝas venteto kaj blovas sur la lagan vastajon, kiu jen kaj jen grize sulkiĝas. El la okcidento etendiĝas brila ora ponto. La koloroj de la ĉielo ŝanĝiĝas, aperas kvazaŭ flamoj antaŭ la suno kaj poste bluaj longaj

nubostrioj. La blankaj kumulusoĵ malaperis. La vespero estas serena kaj trankviliga. *Elma* konsolas sin, ke ankaŭ en maljuna aĝo oni povas senti kontenton, eĉ feliĉon. Vere ne indas zorgi kaj maltrankvili, imagi la futuron. Unu aŭ du geamikoj sufiĉas por savi la tagon.

Verkis Saliko el Finnlando

## Artikolo aperinta en “Vikipedio” *Jean ZAY*

### Enkonduko de *Claude LONGUE-ÉPÉE*



similaj kondiĉoj kiaj la nun proponitaj, tiam kun oficiala permeso de la edukdistrikta inspektoro – unufojon ĉiusemajne dum tri kvaronhoroj de la tagmeza ripozperiodo, al deko da *CM1-CM2*-anoj, laŭ iel kontentiga asidua atento kaj sufiĉe bona rezulto de la gekursado.

Nu! En la nuna periodo, SAT-amikaro kaj *Espéranto-France* – kune kaj surbaze de komuna peticio – rilatas kun la ministerio pri instruado kaj kun diversaj oficialuloj, cele al alpreno de Esperanto kiel opcio en abiturienta ekzameno. Mi opinias, ke estas oportune, ke samtempe multaj emeritaj (aŭ ne) samideanoj rilatu kun siaj urbaŭtoritatoj, por havi eblecon prireklami kaj instrui Esperanton al la juna lernantaro.

Pridiskutante tiujn problemojn, kadre de kunveno de asocioj, organizita de la vilaĝa urbestro, mi aludis pri la agado de *Jean ZAY*, kiam li estis ministro pri instruado kaj favoris en la lernejoj la instruadon de Esperanto, kadre de “socieduka aktiveco”, per ministra cirkulero de la 11-a de Oktobro 1938.

Tio okazis post la longa periodo de malpermeso de Esperanto trudita de *Léon BERARD*, post ties kontraŭstara negativa sinteno en 1923 en la “Societo De la Nacioj” (*SDN*).

En Vikipedio estas privilegbla la vivo kuraĝa kaj tre homanisma de *Jean ZAY*, travivita ĝis lia mortigo far familicianoj en 1944.

Mi ĉi-sube tradukis kelkajn paragrafojn de la Vikipediaj artikoloj.

Enkondukis *Claude LONGUE-ÉPÉE*

### De *Jean ZAY*, la idearo pri reformoj

Laŭ *Jean ZAY*: “La Respubliko antaŭ ĉio baziĝas sur la civitaneco kaj la inteligenteco de la civitanoj; tio estas sur ties intelekta kaj morala eduko...”

... Kontraŭ la socia konservemo, sed ankaŭ kontraŭ la revoluciemaj utopioj, la politiko estas tiu movado, pere de kiu la homaro pliperfektigas kaj iamaniere memdigniĝas.”

*Jean ZAY*, ekde sia plenaĝeco, opinias, ke: “La intelektulo ne povas ne partianiĝi en la debatado, kiu ĉiutage puŝas la civitanojn unujn kontraŭ la aliajn.”

Unu el la karakterizoj de la eduk-sistemo, kiun *Jean ZAY* pleje bedaŭris, estis tiu, kiu okazigis la pardonon por la Respubliko de regnanoj grandvaloraj, laboremaj kaj kapablaj, kiuj pro manko de mono ne povis atingi postenojn, en kiuj ili povintus donaci la plejan bonon el si mem. Male de tio, senvvaloraj kaj mallaboremaj uloj, danke al sia riĉeco, ne malfacile povis atingi altan “publikan ŝtatfunkcion”; eĉ sen kongrua instruado.

Tial estiĝis la ideo pri *ENA* (Nacia Lernejo pri Administrado); kiu realiĝis nur post la milito.

La granda projekto de *Jean ZAY*, pri reformo de la instrusistemo, estis proponita en 1937. Sed ĝi estis “torpedita” de la Priinstrua Komisiono de la Nacia Asembleo... Kiu neniam ĝin pridebatis!

Tiu projekto estis unu el la plej ellaboritaj iam konceptitaj, kaj unu el la plej demokratecaj en la tiama epoko. Ĝi eliĝis el la sama konvinko, laŭ kiu la virto, la intelektaj kapabloj, kaj – ni diru, uzante ekskutiman esprimon – la koro, ne estis karakterizoj de la bonhavaj socialaj klasoj. Laŭ tiu konvinko, la socio povis nur elprofiti de la projekto, donante la plejmulton da eblecoj al ĉiuj, kaj pli bone formante la plejmulton da lernantoj. De *Jean ZAY* la projekto pri reformo ĉefe rilatis al la “Liceoj por junulinoj” kaj al la “Lernejoj por bazinstruistoj” (*Ecole Normales Primaires*).

Ni reloku ankaŭ la agadon de *Jean ZAY*, laŭ pli materia vidpunkto, en la agadon de la registaro de la “Popola Fronto”, kiu celis plivastigi ĝis la “Laboremaj Klasoj” pli bonkvalitan vivon.

La atingo de tia celo, laŭ *Jean ZAY*, necesis tiom da kulturo kaj da instruo, kiom da libera tempo: tiuj famaj “Pagitaj Ferioj” nuntempe konsiderataj kiel emblemoj de tiu periodo.

### De *Jean ZAY*, la realigado de reformoj

Ekde la rekomenciĝo de la lernejaroj de 1936, *Jean ZAY* plilongigas de la 13-a ĝis la 14-a jaro de la aĝo la lernadan devigon, per la leĝo de la 6-a de Aŭgusto de 1936.

Anstataŭ tujtuje percirculere difini la enhavon kaj la programojn de tiu lasta lernejaroj de la bazaj studoj, li lasis: “Tutan liberecon de iniciato al la instruistoj”.

Li difinis nur trioblan komision:

“Organizi en tiuj finaj klasoj: suplementon de instruado; inicado al la kulturo; profesian orientadon”.

Lia metodo konsistis el:

“Estigo de iniciatoj... kaj ĉi-ties posta kribrado kaj elektado”.

Por enigi tri horojn de gimnastiko en la baza instruado, li lanĉas eksperimenton, komence en tri departementoj kaj poste en dudeknaŭ.

Li same disvolvas estritajn aktivajn: la “Promenklasojn”; la studadon

de la medio, per aktiva observado en la unuagrada lernejoj, kaj per estrita distrado en la duagrada lernejoj. En Septembro de 1938, novaj oficialaj instrukcioj enkadrigas kaj plivastigas tiujn ekŝanĝojn.

Je la 2-a de Marto de 1937 li proponas, je la nomo de la registaro, projekton de reformo de la instrusistemo; inspirita de la riprenoj kaj proponoj pri unusola lernejo naskitaj depost la unua mondmilito. Tiu projekto celanta demokratigon ŝokas la defendantojn de tradicia duagrada instruado; ĉi-tiuj la projekton “enterigas”.

*Jean ZAY* perdekrete reorganizas la administraciojn, anstataŭigante la enhavojn kaj la estradojn de la “dua nivelo” (*secondaire*) kaj de la “unua nivelo” (*primaire*) per tiuj de la “dua grado” kaj de la “unua grado” (*premier et deuxième degrés*).

Li donas al la “unua ciklo de la dua grado” (*premier cycle du deuxième degré*) kaj al la “supera unua nivelo” (*primaire supérieure*) la samajn programojn.

Li eksperimentas, je la nova lernejaroj de 1937, en 175 establoj, la “sesan klason” (*classe de sixième*) por orientado, por observi la lernantojn antaŭ ol ilin direkti al unu aŭ alia “sekcio” (section) de la dua grado. Li tiel kreis komunan trunkon, el kiu eliĝis pluraj branĉoj. Tiu arkitekturo estos alprenita kaj ĝeneraligita de la novaj klasoj de la Liberigo, sed sen ververa komuna trunko, en la jaroj 1959-1963.

[\*\*\*]

Aliaj aranĝoj estas alprenitaj tiaj ekzemple, kiaj la enretigado de la centroj de profesia orientado, kaj kiaj la kreado de la supera komitato de la organizaĵoj por la lerneja kaj universitata junularo (praajo de la “Regionaj Centroj de la organizaĵoj universitataj kaj lernejoj” (*CROUS*), kiuj naskiĝos post la dua mondmilito).

Helpate de *Irène JOLIOT-CURIE* kaj poste de *Jean PERRIN*, ŝtataj vicsekretarioj, li organizas la “Sciencan Esploradon” (*CNRS*).

Li provas krei “Nacian Lernejon por

Administracio”; sed la projekto de leĝo, proponite la 1-an de Aŭgusto de 1936, devis fronti al multegaj kontraŭstaroj.

Li konceptas trimonatan instrustaĝon, por specialigi funkciajn instruistojn.

Je Pasko de 1937 organiziĝas staĝo, kiu naskos la “Centron de Trejnado al Metodoj de Aktiva Edukado” (*CEMEA*).

*Jean ZAY* opinias, ke estas dezirinde faciligi la lernadon de “Esperanto”. Ĝia instruado estas enkondukita kadre de la sociedukaj aktivecoj pere de ministeria cirkulero de la 11-a de Oktobro 1938.

Kiel ministro de la Belartoj, *Jean ZAY* kreis la “Kunigon de la naciaj lirika teatroj” kaj la “Nacian muzeon de la popolaj artoj kaj tradicioj”.

Aliflanke li subtenis la principon de rondirantaj bibliotekoj nomataj “bibliobus”.

Li proponis la kreadon de la “festivalo de Cannes”, kies unua eldono, antaŭvidite en Septembro de 1939, ne povis okazi pro la komenciĝo de la dua mondmilito.

Eltirita de “Vikipedio”  
Elfrancigita al Esperanto  
de *Claude LONGUE-ÉPÉE*

### [\*\*\*] Komentoj de *Claude LONGUE-ÉPÉE*

Verdire, dum mia tradukado, mi multe ŝvitis kaj stumblis fronte al specife francaj terminoj kaj esprimoj de la franca instrusistemo.

Mi antaŭdankas al samideanoj – instruistoj – profesoroj, kiuj povos kaj bonvolos sendi al mi por la Norda Gazeto, artikolon kun alesperantaj tradukoj tutmonde klare kompreneblaj kaj adapteblaj al ĉiuj diversaj niveloj de la lernado en la mondo, de la terminoj:

*Primaire et secondaire; Premier et second degré; Premier et second cycle; Primaire supérieur; Sixième et cinquième*; ktp.

## Traduko

## “Principiis obsta et finem respice”

## La komencon kontraŭstari, la finsekvon antaŭvidi

Teksto de Milton MAYER, tradukita de Roland PLATTEAU

## Komento de Roland PLATTEAU

La ĉi-sekvanta teksto esprimas situacion kaj pensojn, kiuj forte pensigas pri la nuna situacio evoluanta de kelkaj jaroj – kaj pli kaj pli ĉiujare – en la landoj de Eŭropo, kaj ankaŭ en Usono. Ĉu ne?

Tamen, estas detaletio: tiu teksto ne estas verkita hodiaŭ. Ĝi troviĝas en libro eldonita en 1955. La aŭtoro, Milton MAYER, elvokas konversacion, kiun li havis kun kolego travivanta la saman epokon... Kiun epokon?

La titolo estas: “Ili kredis sin liberaj. La germanoj – 1933-1945”.

Komentis Roland PLATTEAU

## Principiis obsta et finem respice

Iam tiel argumentis iu kolego mia, pri iu travivata procezo:

“Nia travivado de tia procezo implicas – bonvolu ja kredi min – nian tutan nekaptablon konscii pri ĝi. Escepte por tiu inter ni, kiu havus plene politikan senton; kiu havus tian klarvidon, kian plej multaj inter ni neniam havis okazon uzi.

Ĉu eliro el tiu procezo, ĉu antaŭeniĝo estas tiom malgranda, tiom senkonsekvencia, tiom bone aprobata, eĉ se kelkfoje “pribedaŭrita”, ke tiun procezon ni ne vidas ĉiutage disvolviĝi same kiel la terkultivisto sur sia kampo ne vidas kreski la tritikon, kiu tamen baldaŭ pli altos ol li mem. Escepte por iu, kiu estus tute fremda de tiu procezo ekde la komenco. Escepte por iu, kiu komprenus ĉion, kion tio signifas en sia fundamento; kiu komprenus tion, al kio kondukas ĉiuj tiuj “paŝetoj”, kiujn neniu povus dece kritiki.

Kiel al tiu disvolviĝo de la procezo povus subiĝi ordinaraj homoj, ĉefe kleraj ordinaraj homoj? Verdire mi ne scias. Eĉ nun mi tute ne vidas kiel!

Oftege, post kiam ĉio tio okazis nun, mi cerbumis pri tiuj du gravaj maksimumoj: “Principiis obsta et finem respice”, “La komencon kontraŭstari, la finsekvon antaŭvidi”.

Sed, por la komencon kontraŭstari,

necesas la finsekvon antaŭvidi! Necesas, ke oni antaŭestigu la finon certe kaj klare, ke oni antaŭsciu kiel tio okazas, fare de ordinaraj homoj, aŭ eĉ de neordinaraj homoj.

Aferoj eble okazos? Kaj ĉiuj kalkulas je tiu “eble”.

“Vidu” pluparolis mia kolego: “Oni ne klare vidas kie, kiam, kiel elpaŝi”.

Vi kredu min: tiel estas. Ĉiu ago, ĉiu nova evento pli malbonas ol la antaŭa, sed nur iomete.

Do, vi atendas la sekvon, kaj poste la pluan sekvon. Vi atendas gravan skuantan eventon, pensante ke, kiam tia skuo venos, la aliuloj sin kunligos por iel rezisti. Vi ne volas ekagi sole; vi eĉ ne volas ekparoli sole; vi ne volas “elpaŝi el la vojo kaj naski ĝenojn”.

Kial ne? Vi ne kutimas tiel kondukti. Kaj fortenas vin nur timo, la timo vin retrovi sola. Via timo, sed ankaŭ simple via necerteco.

La necerteco estas ja gravega faktoro; anstataŭ malpliigi laŭ la tempopaso, ĝi male pliigiĝas.

Ekstere, sur la stratoj, en la komuna socio, “ĉiuj homoj estas feliĉaj”. Neniu protesto aŭdeblas, neniu protesto videblas. Ene de via universitata komunumo, ene de via persona komunumo, vi babilas private kun kolegoj. Kelkaj inter ili ja sentas la samon kiel vi. Sed ili diras: jen “La cirkonstancoj ne tiom malbonas”; jen “Vi imagas viajn aferojn”; jen “Vi estas

troo timemulo”. Tio igas vin respondi: “Estas vi troa timemulo, kaj ĉi-tio kondukos al tio”. Sed pruvi tion vi ne povas.

Tio estas la komenciĝo. Sed ĉu vi povas esti certa pri tio? Kiel vi tion scias, dum vi ne konas la finon? Vi perdiĝas en pensadoj pri la ebla ontanta fino. Sur unu flanko, viaj malamikoj, la leĝo malaplabligas vin. Sur alia flanko, via kolego vin taksas pesimisto aŭ eĉ neŭrozulo. Al vi restas nur viaj plej proksimaj amikoj, kiuj memkompreneble ĉiam pensas kiel vi.

Sed malpli da amikoj vi havas nun. Kelkiuj ŝanĝis sian fakon aŭ enprofundiĝis en sian laboron. Vi renkontas malpli multe da ili dum viaj renkontoj aŭ kunvenoj. La neoficialaj rondoj maldikiĝas. La vizitoj en malgrandaj societoj malaltiĝas. La asocioj mem malkreskas.

Nun, kun amikoj vi havas la impreson, ke vi parolas nur al vi mem, kvazaŭ vi estus izolita for de la vera realo. Pro tio malfortiĝas, eĉ mortantas via memfido. Pli kaj pli vi malemas agadi; Agadi pri kio? Agadi por kio?

Daŭre estas klare, se vi faras ion, ke vi kompreneble estas “agitisto”. Do, vi atendas, kaj atendas...

Sed la grava evento, tiu kiu disskuas, tiu kiu kunligos kun vi dekojn da miloj da sampensuloj, tiu grava evento neniam okazas. Ne tiaj okazas la aferoj. Tio en la aferoj estas la tubero.

Estas centoj da malgrandaj antaŭenpaŝoj, kelkaj apenaŭ percepteblaj. Ĉiuj el ili alkutimigas vin esti ne ŝokita de la sekvonta. La “C” ne estas tiom pli malbona ol la “B”. Kaj, se vi ne ekstaris kontraŭ “B”, kial vi tion farus kontraŭ “C”? Kaj kontraŭ “D”. Kaj sekve...

Sur tiu nova nivelo vi vivadas. Vi estas vivanta ĉiutage pli komforte, kun novaj moralaj valoroj, novaj principoj. Vi estas konsentanta pri aferoj, pri kiuj vi neniam estus konsentinta antaŭ kvin jaroj, antaŭ unu jaro. Vi estas konsentanta pri aferoj, kiujn via patro neniam povis eĉ imagi!

Nu jen! Ĉio disfalas en unu fojo! Vi ekvidas tion, kio vi estas, kion vi faris, aŭ pli precize kion vi ne faris (ĉar tio estis petita al ni ĉiuj: nenion fari). Vi memoras viajn antaŭajn renkontojn en via universitato; kiam, se unu ekstarintus, la aliaj eble ekstarus... Sed neniu ekstaris. Eta problemato staras: dungi tiun ulon aŭ dungi tiun-ĉi; kaj vi dungis tiun

prefere ol tiun-ĉi. Vi memoras ĉion nun, kaj via koro krevas... Tro malfrue!... Antaŭe vi tre multe kompromitiĝis, tro multe por povi reboniĝi.

Tradukis Roland PLATTEAU

## Originale franclingva novelo verkita de **Lydie BOUVELLE** La telerbretaro (tria kaj lasta parto)



### Ĉapitro 5-a – LA ELIRO (sekvo)

Fine necesis ĝuste pri-konsideri tiujn simptomojn, antaŭvidi la efekton de tiu tumoro al ŝia kapablo surprizi ŝiajn devojn, ŝian aŭtonomion.

Ankaŭ pri tio neniu povis fakte antaŭvidi la manieron, laŭ kiu ŝia malrapida agonio disvolviĝos. Estis certe, ke ĝis la normala tempolimo ŝi perdos ĉiujn, aŭ preskaŭ ĉiujn, siajn proprajn rimedojn, kaj ke tiam la enhospitaligo fariĝos neevitebla. Normale, tiu defalo estos iompost-ioma. Sed ŝi devas ekde tuj sin prepari al tio, sian familion antaŭsciigi, sin organizi; ĉar ĵus antaŭ la enhospitaligo, ŝi ne plu povos mem elturniĝi.

Jes, tio evidentiĝis. Sed tio ne estis facile farebla. Ŝi ne estu anoncanta tiun sciigon al iu ajn, kaj precipe al Paŭlino, ne havante konkretajn solvojn por la malfacila periodo, kiu anonciĝis. Antaŭ ol havi la rimedon prikonsentigi tiun situacion al la aliaj kun minimuma serenecon, necesis, ke ŝi mem ĝin prikonsentu.

Ŝi estis mortonta. Kiel ĉiuj memkompreneble. Tio estas la fatalo, disdividita al ĉiu homo. Tamen, ŝi estis certa, ke, same kiel ŝi, ĉiu persono, eksciante ke ĝi estas trafita de nekuracebla malsano, ricevas la sciigon de sia morto kiel novan fakton. Ŝi ja malkovris, ke ŝi estas mortonta.

Paroli pri la morto, paroli pri sia morto, povis *Izabela*. Ŝi havis siajn proprajn konvinkojn pri la post-

vivado. Sed nun ne plu temis pri parolado, temis pri la travivado de la morto. Kio estas la morto? Ĉu finiĝo de la vivo? Jes, sed kio estas efektive tiu finiĝo? Ĉu komenciĝo de alia stato? Kaj kia? Kie? Kiel?

Forlasi tiun mondon ne estis tio, kio estas plej malfacile konceptebla, konsentebla. Alveni en la alian mondon, tio estis malfacile konceptebla. Kio estas tiu nekonataĵo, kio atendas nin ĉe la alia flanko de la lasta elspiro? La homoj, kiuj travivis spertojn pri tuja ekmorto, liveras trankviligajn atestojn. Se oni fidus al ili, estas lumo kaj ĝojo, kiuj atendas nin. Sed tiuj personoj ne vere estas mortintaj, ĉar ili estas ankoraŭ vivantaj. Eble ili travivis alian sperton, kiu eble ne estas transmetebla al la definitiva morto.

Escepte se, kompreneble, ne estas transmorta mondo. Se nenien alvenas la veno. Tiam la morto estus fina tempofino, ne nur de nia ekzisto, sed de nia estaĵo, kiu malaperus en la neniecon, en la nevevecon.

Do ŝi havas, ĉu estontecon malsaman, sed misteran, ĉu la neniecon. La nenieco, eĉ pli malfacile difinebla, priksiderebla, pripensebla ol la nekonateco.

*Izabela*, kvietigite de tiuj konsideroj, dummomente amuziĝis pri si mem. Feliĉe ke ŝi ne kredas je la infero, se ne ŝi devus mem ekzameni sian konsiencon.

Finfine ŝi trafis iun serenecon, konsentante resti en la necerteco kaj vidi kiam venos la momento. Ŝi ne plu timas. Almenaŭ ŝi malpli timas.

Ĝis nun, la tuto de la vivantoj kontraŭstarintaj sian morton sukcese trapasis la malfacilon. Ankaŭ ŝi devus tion sukcesi. Tiam ŝi starigas al si la bonan demandon, kiu lumigas per nova lumo la pasintecon: "Kiel ŝi pasigos la bonsanan kaj vivfortan tempon, kiu restas al ŝi?".

Ŝi estis atinginta tiun stadion de la evoluo de siaj pensoj, kiu instigis ŝin starigi realajn prioritatojn, kiam ŝi eksciis, ke neniel ŝi estas malsana.

Inter la prioritatoj, kiujn *Izabela* estis komencinta konsideri, estis la ekhavo de rendevuo kun *Isaac NEWTON* (homonimo), internacie fama resanigisto, vivanta miraklofaristo.

Sed ŝi ne plu bezonis lin viziti, ĉar ŝi renkontis alian miraklofariston en la persono de sia kuracisto. Iliaj metodoj estas malsamaj. La kuracisto, li, eraris pri la dosiero.

Tion li klarigis al ŝi, superŝutante ŝin per klarigoj ĝiantaj ne koheraj pro embaraso kaj parazitataj de senkulpigoj.

*Izabela* daŭre sidas en sia fotelo. Ŝia interna kataklismo kvietigis, lasante koleron elmontriĝi, kiu naskiĝas en ŝia ventro. Estas malhumana tio, kion tiu stultulaĉo vivigis al ŝi. Tuj ŝi sin skurĝas. Antaŭ apenaŭ kvaronhoro vi certis morti en suferoj; nun vi scias, ke neniel gravas al vi. Sekve ne perdu tempon enkoleriĝante, ĝoju kaj profitu la vivon al vi redonitan. Eĉ fare de stultulaĉo.

Ŝi forlasis la entreprenojn kaj re-  
hejmeniras. Ŝi longatempe duŝas sin



kaj sin vestigas. Ŝi tiam memoras pri la maltrankvilo de Paŭlino, de kiu ŝi fuĝis lastatempe; kaj ŝi memoras pri ties invito por vespermanĝi.

Ŝi tiom agrable festus kun Paŭlino, Paŭlo kaj *Sam* sian resaniĝon, dum ili ne estis antaŭe informitaj pri ŝia malsano. Ŝi rakontos al ili. Eble?... Pli poste...

Ŝi telefonas al Paŭlino, mensogante: "Mia karulino, jen mi finfermis mian dosieron, tial, se via invito ĉiam validas, mi alportos la ĉampanvinon!". Paulino, post momento de miro kaj hezito, ĝojas kaj petas ŝin iri serĉi Paŭlon antaŭ ol veni; ĉar li antaŭvidis malfrue rehejmeniri kaj informis ŝin, ke li malŝaltas sian poŝtelefonon por ne esti ĝenata.

Je la momento kiam ŝi parkas sian veturilon apud la oficejo de Paŭlo, *Izabela* vidas lin eniri en la vidalvidan trinkejon. Li tenas la brakon de juna virino. Ilia sinteno klare elmontras ian familiarecon, kaj tiu bildo ne multe plaĉas al *Izabela*. Ŝi ne juĝas, sed ŝi ne ŝatas. Ŝi eliras el la veturilo. Paŭlo kaj la juna virino staras antaŭ la enirejo de la trinkejo. Ŝi atendas, ne sciante, ĉu ŝi devas tien aliri aŭ ne. Ŝi timas esti anonconta sciigon, pli grava ol sia propra morto, al sia fratino.

Ŝi ne antaŭvidis la vigan atenton de Paŭlo. Kelkajn minutojn post ilia eniro, ŝi vidas la junan virinon eliri, kun vizaĝo nekomunikiga. Ŝi estas elreviĝinta, se ne trista.

*Izabela* decidiĝas siavice eniri kaj iras al Paŭlo. Li diras, ke li vidis ŝin en la speguliĝo de la pordo, precize kiam li estis enironta en la trinkejon, kaj ke li atendis ŝin: "Mi kredas, ke vi savis mian vulton, *Izabela*. Mi estis faronta egan stultajn ĉi-vespere. Sed kiam mi vidis vin en la vitro, mi fakte vidis Paŭlinon, kaj mi ricevis elektroŝokon. Mi neniam povus vivi kun iu alia, estas neeble. Tion mi certigas al vi; mi ĉesigis ion, kio ankoraŭ ne komenciĝis".

Li subite demandas ŝin, kial ŝi staras tie; ĉu estas problemoj en la hejmo? *Izabela* parolas al li pri la vespermanĝo, pri la ĉampanvino, kaj ŝi informas, ke ŝi simple estas mesaĝoportantino.

Paŭlo estas kontenta, liberigita sed iom maltrankvila. Ĉu *Izabela* inform-

os Paŭlinon pri tio, kion ŝi vidis?

Ne, *Izabela* diros nenion, ŝi fidas al li, kaj ĉiel tio ne vere koncernas ŝin, ŝi ne volas enmiksiĝi; kaj ŝi diras, lasante Paŭlon en plena enigmo: "Oni ja povas apogi sin reciproke, inter postvivantoj."

## Ĉapitro 6-a – LA DUA SPIRO

La sceno tiom meritas la ekrigardon, kiom tiu alia sceno rigidiginta antaŭ du monatoj.

Ili ĉiuj triope duoncirkle staras antaŭ la telerbretaro. Ili elmontras la saman grandan rideton estigatan de la meblo, kiu, starigite en la kuirejo kaj stabile subportante la kutiman kaj la ceremonian teleraron, plenigas la malplenan lasitan de sia antaŭintaĵo.

La decido reaĉeti telerbretaron estis alprenita dum la vespero, kiam *Izabela* serĉis Paŭlon.

Estas li, kiu unue parolis pri tio. Li tion faris senĝene kaj entuziasme, mokpikante sian propran mallertecon, kio multe amuzis la ĉeestantaron.

Paŭlino estis mirinta pro tiu subita humorŝanĝo, kaj ŝi estus volonte atribuinta al sia fratino magian povon, se tiu ĉi ne estus mem aparte malstreĉita kaj gaja. Tamen ŝi, same kiel *Sam*, sekvis tiun bonhumoron, ne plu sin demandante.

Tiu gajeco estis naskinta facilecon kaj fluidecon en iliaj rilatoj. Ĉiu profitis tion por senĝene kaj sendolore fari sian memkritikon pri la rolo de si ludata en la pasinta familia katastrofo; kaj ĉiu sin poziciis rilate al la respondeco, kiun ĉiu deziris ricevi por la starigo de la nova telerbretaro. Antaŭ tio, kompreneble senkaŝa diskutado okazis, pri la stilo kiun ĝi devos havi kaj pri ĝia kosto. Ili interkonsentis pri alia meblo de *Sam*, Paŭlo kaj Paŭlino rimarkita, kiam ĉi tiuj aĉetis la unuan meblon. Ili decidis serĉi ĝin kune, por esti certaj, ke ili bone elektis, sin devigante esprimi sian opinion je la momento de la aĉeto, eĉ se tiu opinio ŝanĝiĝos kompare al tiu antaŭe esprimita.

Paŭlino la unua postulis, kaj tio estis premiero, la rolon, kiun ŝi volis ludi: aĉeti la teleraron, ne partopreni en la muntado de la telerbretaro, sed

poste enordigi laŭ sia vidmaniero la teleraron. Tio estis senhezite prikonsentita.

*Sam* duavice parolis. Li proponis al sia patro skipe labori. Kune ili laŭspecigos la pecojn, ŝraŭbojn, boltojn kaj aliajn kunmetotajn elementojn. Li mem, etapostetape, legos la uzindikojn. Paŭlo, sekvante liajn indikojn, faros la muntadon. Kiam li bezonos kvar brakojn, ili kune agados, dum Paŭlo gvidos la manovron.

Tiu ĉi, kiu ne trovis, aŭ ne serĉis, ian kontraŭdiron, konsentis kun tiu organizo. Li ne povis sin deteni gratuli *Sam* pro lia praktika menso, kaj *Sam* ne povis sin deteni rozkoloriĝi pro plezuro.

Dum tiu tuta diskuto, *Izabela* restis neparolanta, ridetante al la anĝeloj, kiujn ŝi imagis laborantaj por krei tiun harmonion.

Kiam Paŭlino demandis ŝin pri la rolo, kiun ŝi ŝatus ludi, ŝi elektis tiun kiun ŝi nomis: "Inspektorado de la finitaj laboroj. Mi venos admiri la faritaĵojn kaj ekzameni ilin per kritikema okulo. Vi povas prepari la ĉampanvinon."

Tiun ĉi vesperon *Izabela* nenion plu diris. Pro sindonemo kaj pro egoismo ŝi ne volis riski perturbi la etoson per sia problemoj. Se tio bone finiĝis, tamen tio estis ege malplaĉa, kaj ne mankus minimume malgajigi Paŭlinon; eĉ se tio okazus nur pro la silento kiun ŝi konservis al ŝi. Ŝi ne deziris klarigi al ŝi ĉi-vespere, kial ŝi nenion diris al ŝi. Ŝi ne volis perdi, parolante, la intensan ĝojon, kiun ŝi sentis surpreriranta kaj disvolviĝanta en si. Ŝi sciis, ke gravas tio, kion ŝi sentas ĉi-momente. Tion ŝi ne kapablis esprimi, ne difektante tion. Kiel trovi la vortojn, por priskribi sentojn, emociojn, kiujn ĝis nun oni ne sentis, por priskribi staton, kiun oni neniam konis. La vualoj de ŝia psiko iom post iom disigiĝis, ne ŝirigante, lasante aperi la simplecon, la travideblon de la vivo. Ŝi preferis ĉi-vespere lasi la ĉefrolon al la telerbretaro.

Ĉiuj amuziĝis pro la sprita rebato de *Izabela*, kaj Paŭlo solene engaĝiĝis fari rezervon de ĉampanvino por la taŭga tago.

Tiu tago estas alveninta.

Ĉiuj tri, kun pokalo en la mano, estas en beata admiro antaŭ la telerbretaro.

*Sam* estas feliĉa pro la posttagmezo, kiun li travivis kune kun sia patro. Lia plano tre bone funkciis. Okazis eĉ ne ununura problemo. Ĉio disvolviĝis sen iu ajn misaĵo, laŭ profesieca laboro. Li estas kontenta pri si mem, sed ĉefe pri sia patro. Tiu ĉi traktis lin kiel egalulon, kiel viron, neniam pridubante liajn indikojn. Li fidis al li, li fidis al lia prijugo. Tio estas kontentiga kaj sukcesa sperto. Li mem kapablis transpasi sian timon pri eraro, li kapablis ne erarigi sian patron, ne ĉagreni lin. Tio tiom bone disvolviĝis, ke li sin demandas kial. Kio diferencas? Nenio, se oni taŭge observas. Nenio, krom eble la mensotato, per kiu li alpaŝis tiun laboron. Li estis memvola. Li konstatis esti ŝargita per iu respondeco, kiun li ja deziris surprizi. Kaj lia patro kunludis la ludon, restante ĉe la loko, en kiu li konsentis okupiĝi.

Kaj, por konsekri tiun statuson, li troviĝas tie, kiel liaj gepatroj, kun glaso en sia mano, partoprenante en tiu ceremonia pastiĉo, kiun ili organizis laŭ sinteno de festa mokado. Cetere, bone konsiderite, tiu etoso regis en la hejmo de post la vespero, kiam estis decidita la aĉeto de la nova telerbretaro. Finfine ne, tiel ne estis. De tiu vespero blovis en iliajn spiritojn nova vento de libereco. Lia patro, lia patrino, montris vizaĝojn pli helaj, ili starigis demandojn kaj donis respondojn pli rektaj. Li mem sin sentis multe malpli inklina al la sekreto.

*Sam* rigardas siajn gepatrojn, ili estas pretaj, same kiel li estas preta. Ili estas pretaj lasi lin eniri en la mondon de la plenkreskuloj.

Paŭlo havas la impreson, ke li retrovis sian dudekan vivjaron. Li sentas sin bonstata, facilanima. Li trovis la vojon kondukantan al *Sam*; ĝi estas la sama kiu rekondukis lin al lia memo. Tio estis simpla, kaj tio estis ne realigebla tiom longe, kiam li enfermiĝis en siaj kondiĉaroj. Li estis tentita fare de *Gaëlle*, kaj li turmentigis pro tiu

tento. Ĝi igis lin konsideri sian vivon kiel kaptilon. Li kredis, ke li estas kaptita de sia edzeco, kaj de siaj respondecoj. Sed estis malvere. Li ankoraŭ nun ja estas edzo, kaj ankoraŭ nun ja havas la samajn respondecojn, sed li tamen sentas sin libera. Li enkarcerigis sin mem, ĉar li neglektis prizorgi sian vivon kaj siajn elektojn. Li forgesis rekonsideri ĉiutage tiujn elektojn, por kontroli ĉu li ĉiam akordiĝas kun ili. Li konstruis mem sian prizondon mensan; nur mensan.

Li certe kredis, ne vere pensante pri tio, ke iu elekto estas definitiva. Sed la elektoj portantaj la vivon, anstataŭ sufoki ĝin, ne estas la elektoj, kiujn oni faras nur unufoje por ĉiam; sed ili estas tiuj, kiujn oni faras kaj ŝanĝas konstante.

Tiu mistaksado kondukis lin ĉion rekonsideri, por denove sin senti vivanta, farante alian elekton. *Gaëlle*, malgraŭ la respekto de li konservita al ŝi, estis nur preteksto al reĝustiĝo. La interveno de *Izabela*-Paŭlino simple ebligis, ke li metas finan punkton al tiu reĝustiĝo.

Li estas la sama homo, sed li havas je sia dispono la tutecon de tiu homo, kaj tiu ĉi kapablas komuniki kun sia filo tiel, kiel li ĉiam deziris. Kaj "estas ĉerizo sur la kuko": La telerbretaro estas staranta. Kaj ne, tio ne estas la plej malgrava el liaj zorgoj.

Paŭlino admiras sian telerbretaron. La sukceso de la entrepreno naskas ŝian alproprigadon. Al Paŭlino tio estas memkomprenebla. Tiu tago reprezentas apoteozon, kiun ŝi plene aprecas kaj plibeligas per sia nova sinteno. Ŝi kvazaŭ ŝaŭmas, kiel la ĉampanvino, kiun ŝi tenas en la mano.

Paŭlino ĉiam havis tre belajn trajtojn, delikatajn kaj harmoniajn. Atinginte la kvardekan vivjaron, ŝi akiris de la matureco la belecon ligitan al maldika kaj svelta silueto. Evidente iom malpli maldika kaj svelta ol dum la dudekaj vivjaroj, sed ĉefe malpli freŝa. La beleco de la juneco esprimiĝas per leĝeraj senemfazaj vortoj. Hodiaŭ oni diras pri Paŭlino, ke ŝi estas bela virino, eĉ tre bela

virino. Kiam ŝi estis juna, ŝiaj ecoj estis de "agrabla, beleta fraŭlino". La diferenco estas pli en la pezo de la jaroj ol en modifo de ŝia ekstera aspekto.

Tio, kion Paŭlino travivis kiel disordigon de la familia ekvilibro, kaj kio igis ŝin malgraŭvole nenion vidi, ŝia deziro ke ĉio restu neŝanĝebla, ŝia deziro sin turni en sin mem kaj rigardi la transformiĝon de la rigardo de la aliaj, ĉio tio estis antaŭe en la naturo de Paŭlino. Ŝi konsentis kun tiu bildo farita de matureco, dum funde de si mem ŝi restis la eta Paŭlino, la juna Paŭlino.

Kaj okazis tiu fama vespero, kiam *Izabela* kaj Paŭlo revenis, kvazaŭ transformite post morozaj semajnoj. Tiun vesperon ŝi sciis, ne provante serĉi pri kio temas, ke io okazis. Ŝi lasis sin esti allogita, kiel faris *Sam*, de tiu nova entuziasmo, de tiu nova libereco; kaj siavice ŝi esprimis ĝin. Estis tiel agrable.

Ankoraŭ nun ŝi ne scias, kio kortuŝis kaj liberigis Paŭlon. Eble li bezonas iam paroli al ŝi; sed koncerne ŝin, ŝi povas resti nescianta. Nur la rezulto gravas.

Rilate *Izabelan*, la aferoj estas malpli simplaj. Ŝi rakontis al Paulino sian elprovon kaj tion, kion ŝi nomis sian resaniĝon.

De tiu Paŭlino estis emociigita por *Izabela* kaj por si mem. Ŝi estis, ne vundita, sed pikita, de la silento de *Izabela* kaj de la klarigoj de ŝi donitaj. Ŝi ne fidis je sia kapablo trasuferi la malbonan sciigon kaj precipe je sia kapablo alporti la subtenon, kiun *Izabela* bezonis.

Laŭ ŝia opinio, *Izabela* kredis, ke en la plej malbona kazo ŝi estus disfalinta, kaj ke en la plej bona kazo ŝi estus sin kaŝinta malantaŭ senkonvinke konsolaj paroloj. Tio estis malfacile aŭdebla kaj prikonsentebla, sed fakte tio estis vera kaj ne tre glora.

Bela sed malkuraĝa ŝi estas.

Tial ŝi profitis la lecionon kaj ŝi resuprenigis, el la funda fundo de sia estajo, la etan Paŭlino, strikte gracion kaj malmemman.

Ŝi akompanis *Izabelan* en tio, kio estis por ambaŭ realan resaniĝon. Ili

iamaniere reĝustigis siajn internajn horloĝojn.

*Izabela* siaflanke evoluis, rekonsiderante siajn prioritatojn kaj iujn el siaj pensoskemoj, sur kiuj, laŭ sia diro, "ŝi sin blokis".

Paŭlino faris same.

Kaj hodiaŭ ŝi montras tiun ŝanĝiĝon per sia pli ŝercema, pli aventurema humoro, senpere alfrontante la aĵojn kaj la homojn. Ŝi montras tiun ŝanĝiĝon per siaj aktivecoj, strebantaj al la konkretigo de sia persona sinfarado. Ŝi montras tiun ŝanĝiĝon per sia fizika aspekto, elmontranta harojn mallongajn, Venecie blondajn.

Paŭlino, Paŭlo kaj *Sam* estas tuj tostontaj, kiam sonora tinteto

haltigas ilian elanon. La pordo malfermiĝas, sen iu ajn diro de invito je eniro.

"Estas mi... Kaj Manuelo!" **FINO**

Tradukis *Jean DIETRICH*



## Homa tajdo Almenaŭ 6 500\* frenezuloj piedkuris trans "la Somme"!



Temas pri la fama regiona aranĝo "Transbaie", t.e. kunkurado\*\* tra la golfeto de la rivero "La Somme", irkaj-reiro el la haveneto *Saint-Valery* al la vid-al-vida marborda vilaĝo *Le Crotoy*, t.e. ĉirkaŭ 17 kilometroj da sablo kaj ŝlima koto...

Oni rendevuas sur la elirplaco apud la altmoda stacidomo. Kia bunta svarma homamaso el ĉirkaŭ 30 000 uloj, t.e. kelkmiloj da kurontoj kaj kvaroblo da familianaj aŭ amikaj subtenontoj (grava rolo!!) Ĝoĝa festo, en kiu profesiaj sportuloj najbaras grupojn da petolantaj amatoroj, fojfoje klaŭne maskovestitaj.

Komence, ni kuras laŭ densa plotonon sur la asfaltumitaj stratoj de la urbeto dum tri kilometroj; tiam, post ponto superanta la kluzojn, ni paŝas teran

kajon laŭlonge de la rivero Somme, kaj ni trafas la ebenan strandon (je malalta tajdo, kombreneble!): dum kvin kilometroj da pli-malpli ŝlima sablo, ni transvadas flakojn de mara akvo kaj paŝaĉas sur la "mollières", t.e. herbaj ebenajoj trakrucitaj de krutaj kotaj kavoj. Fore videblas la pintaj domoj de *Le Crotoy* (ŝajne tiom proksimaj, sed fakte lacige trafebaj!), kie staras bonvenigita provianta budo: meritita premio, nepre nemalhavenda.

Nun temas pri retrokurado laŭlonge de paralela vojo; jen la lacego sentiĝas, la plotonon estas jam de longe disfibrita, la kurso iĝas elĉerpanta, eĉ teda: hej, plu kuraĝu! Jam aŭdeblas la aplaŭdoj de la spektantoj je la alveno de la unuaj kurantoj (for for antaŭ mi!): tiuj fortikaj sportuloj trakuras la plenan vojon dum malpli ol unu horo, brave! Por la lastaj, ĝi plu daŭros ankoraŭ du horojn kaj duonon... Sed ne gravas kiom ajn oni vicas, ĉefas partopreni, ĉu ne?

Surloke ŝvebas ŝvita kaj ŝlima odoro, kombreneble; sed kia amika feliĉo etosas inter ni! "Nur nura plezura

plezuro... kaj ankaŭ iom da lacado" estis promesite: plenumita veto!

### Kelkaj komentoj transgolfante

Pri kio pensas la transgolfeta kuranto? Pri siaj piedoj, pri sia lacego, certe; sed tamen li pensas ankaŭ pri la pejzaĝo, pri la najbaroj, pri sia ĉeesto en ĝi inter ili: oni ja havas tempon por observi, eĉ por mediti; zen!

### Ene de la filmo

Emocias min la sento, ke mi estas nun travivanta densan momenton, kiam mi ja staras ene de tia amaso de homoj, serpentumanta tra tia mirinda marborda pejzaĝo. Per poŝtkarto aŭ televido, hejme sidante en brakfotelo, oni povas imagi la scenaron de iu filmo pri naturekskurso: sed hodiaŭ mi vere estas aktoro en tiu filmo, ne nur mense sed konkrete korpe. Benita momento, feliĉa aktoro!

Vere mi sentas min ano, parto de ĉi-tiu vivanta spektaklo: jen ĝusta signifo de "parto-preni".

### Pilgrimanta homamaso...

Dum mia infanaĝo ni kantis en la

preĝejo "L'immense foule des hommes..." (Vastega svarmo de homoj), aŭ "Tout au long des longues plaines, peuple immense va chantant..." (Laŭ longaj ebenajoj grandega popolo vagas kantante). Jes, ekde centoj da jarcentoj, laŭ miloj da generacioj, la homaro estas vaganta al... al sia destino: ĉu lame stumblanta ĉu vigle decidema, jen "La popolo de Dio, treniĝante... ĝis ci, Promesita Bieno".



Tio ne estu teda afero! Male, kun ĝojo ni kune kuras, helpante unu la alian dum malfacilaj paŝoj, kuraĝigante la elĉerpitajn, kaj eĉ aplaŭdante la fortikajn atletojn kiuj jam inversscen laŭpasas nian vicon (fakte, la reirvojo el *Le Crotoy* paralelas la irvojon, tiel ke kruciĝas ambaŭ vicoj de lertaj kaj malrapidaj kurantoj).

### Ĉu la "Niagara Falls"?

Bruas ĉirkaŭ mi vigla akvoplaŭdo: ĉu malsuprenfluegas montara torento? Ne, nur estas centoj da ŝuoj kiuj vadaĉas tra flako de mara akvo restanta sur la strando...

### Plu kuraĝu!

Min incitas tiuj kurskomisaroj starantaj sur la flanko de la vojo: bonkore ili intencas kuraĝigi nin kriante "baldaŭ alvenos vi!". Baldaŭ, baldaŭ, kompreneble estas baldaŭ: jam ekde la elirpunkto ni estas "baldaŭ" alvenontaj! Alveni, nenion ni faras alie ol tio!

### Ekzerco pri humileco kaj tolereco!

Kvankvam ne temas pri vetkurado kaj ne gravas la rango de mia alveno, mi estas tentita kompari min kun aliaj kunkurantoj. Mi strebas trovi en la plotono aron da kurantoj kiuj samfortas kiel mi; ve, dum la tuta

daŭro de la kurso mi vidas ke mi estas preterpasata de aliaj, eĉ de ŝajne malbonfartantaj; feliĉe, ĉar mi estis bone lokita je la startlinio, restas miloj (poste nur centoj) da kurantoj malantaŭ mi! Tia sporta provo estas taŭga lernilo por ne orgojle fanfaroni, por konsenti pri siaj propraj fizikaj (kaj mensaj) limoj. Jes, same kiel en la normala socio, mi devas agnoski ke ni estas malegalaj, ke ekzistas prauloj, antaŭuloj, sukcesuloj, kiuj pli efikas ol mi; saniga leciono!

Dum la kuro, ĉefe je la reirparto, estas kelkaj benitaj momentoj kiam mi sentas min sola, paŝante laŭ mia propra ritmo, kiel en silenta nebulo; jen min trafas ia dezerto, kvazaŭ mi estus drogata (fakte pro laco la cerbo produktas adrenalinon), mi sentas min zene ĝuanta: plezuro, feliĉo... Sed tamen mi devas akcepti ke iuj ĉirkaŭkurantoj babiladas inter si (kiel ili havas sufiĉe da spiro por tio?) aŭ eĉ bojas misĝentilajn petolaĵojn... Tiel estas ilia propra plezuro, ĉu ne?

### Paroj da kruroj

Antaŭ ol starti, la kurantoj devas ariĝi malantaŭ la elirlinio dum unu horo; teda momento, kiam densiĝas la staranta sunsvenbatata homamaso dum bojegaĉas la laŭsonorilo! Mi trovis loketon, kie mi sukcesis kaŭri ĉe mureto, tiel ke miaj okuloj estis je la nivelo de svarmo da kruroj: amuza perspektivo, per kiu oni spektas la diversecon de gamboj (muskuleco, koloro, vileco, vir-aŭ-virineco) kaj de ŝuoj (alt-aŭ-freŝmodaj, laĉetitaj). Ĉiuj enviciĝis laŭ paroj: mi ne trovis unukrurulon! (Tamen kuros unubrakulo, kaj ĉareto "Joëlette" specifa por handicapulo: brave!)

Hodiaŭ ni ĉiuj havas la saman volon, la saman celon, la saman hobion. Mi konscias ke por ĉiu paro da kruroj kongruas unu ununura persono kiu travivas sian personan sorton, kiu klopodas pri sia persona estonteco, sia persona vojo tra la vivo, trans la

vivo; kiu estas persone zorgata de Dio... Kvankam mi scias, ke ni ne ĉiuj voĉdonas por la samaj kandidatoj, ke ni ne ĉiuj havas la samajn vivrimedojn, ke ni ne ĉiuj sintenas laŭ la samaj moralaj valoroj, tamen mi spertas kion ni anas en la sama homara dikeco.

Tia amaso da bonfartaj kruroj lerte starantaj antaŭ mia vizaĝo ne malhelpas min aludi pri la svarmoj da malliberuloj kiuj estis (plu estas) ĉarĝitaj po centoj en brutarvagonoj direkte al koncentrejoj...

### Strebo, streĉo, peno, sufero,...

**feliĉo**  
Oni praktikas nin masohistaj pro nia strebo praktiki malkomfortan elĉerpantan agadon. Jes kompreneble, ĉiu sporto kaj ĉiu varbiĝo enhavas iom da streĉo, kaj eĉ fojfoje da peno.

Sed oni ne povas nomi ĝin sufero, ĉar verdire ni kuradas por plezuro, laŭ libera volo, laŭ konsentitaj reguloj, sen ekstera perforta trudo. Male, se oni ne aŭdacas fronti iom da rezisto, ĉu oni povas atingi aŭtentan feliĉon?

Vincent **COUROUBLE**  
(mi fieras: ĉi-jare la lasta ne mi estis!)

\* Ili nombris 6300 enskribitojn, sed mi havas la impreson, ke aldoniĝis ankaŭ kelkcentoj da kaŝspasaĝeroj!

\*\* Mia vortaro tradukas "course" per "vetkurso" aŭ per "konkurso", sed mi ne akordiĝas kun ĉi-tio: fakte nenio estas vetinda en tia aranĝo; krome, temas ja pri "kune-kuri", sed ne pri kon(traŭ)kursadi; tikle!



## Publika humuraĵo

# Sekretega sekreto

### ► Merkredon la 5-an de Julio 1972

- Ĵeromo estas juna kontisto. Jam de tri tagoj li ferias eksterlande, kaj estas nun veturanta tra preskaŭ dezerta regiono. Subite krevas malantaŭa pneŭo de lia malnova aŭto, do li haltas kaj elaŭtiĝas. Malferminte la kofrujon li vane serĉas la krandon, kiu verŝajne restis en la remizo de liaj gepatroj, do li ne povas uzi la vicradon! Jam noktigiĝis antaŭ kelkaj minutoj, sed la luno brilas, kaj Ĵeromo ekvidas grandan monaĥejon ĉe la supro de proksima monteto. Post unuhora paŝado li alvenas antaŭ la pordon de la monaĥejo. Ĉar mankas sonorilo, li frapetas la pordon, sed senrezulte. Li do refrapas ĝin, unue per sia dekstra pugno, poste per ambaŭ pugnoj, finfine per dika bastono, kiun li ĵus trovis sur la grundo. Sed la pordo ne malfermiĝas...

Senkuraĝigite, li decidas reiri al sia aŭto, sed je la lasta sekundo li ekvidas ŝildeton sur la muro, kaj danke al la lunlumo li sukcesas legi la jenon: *"La pordisto estas surdega. Tiru la kejleton, kaj la riglileto falos"*. Li do tiras la kejleton, la riglileto ja falas, kaj samtempe malfermiĝas luketo, kaj aŭdiĝas la voĉo de la pordisto: *"Saluton sinjoro! Jen skribilo kaj paperfolio. Bonvolu klarigi skribe la celon de via vizito, ĉar mi estas iomete surdeta"*.

La kontisto do skribas: *"Mia aŭto ĵus paneis. Ĉu mi povus eniri por telefoni al iu garaĝisto?"*. *"Mi ege bedaŭras"* respondas la monaĥo, *"sed ĉi tie ni disponas nek elektron nek telefonon! Tamen, se vi tranoktos en nia monaĥejo, ni jungos morgaŭ du bovojn al nia ĉaro, kaj veturigos vin ĝis la plej proksima vilaĝo"*.

Ĵeromo konsentas, do post apenaŭ dudek minutoj alvenas iu maljuna monaĥo, kiu malfermas la pordon, enirigas lin, kaj kondukas lin al malvarma senfenestra kaj tute senluma ĉelo, en kiu staras nek tablo nek seĝo nek ŝranko. Krome la monaĥo rifuzas lasi al li sian torĉon, kaj tuj foriras. Tial Ĵeromo kuŝiĝas tute vestita sur la

mallarĝan liton, kies matraco fakte estas ligna tabulo. Kvankam li malsatas kaj soifas, li estas tiel laca, ke li baldaŭ endormiĝas.

### ► Ĵaŭdon la 6-an de Julio 1972 je

la 2-a matene li estas sonĝanta pri frititaj terpomoj kaj nekrevigeblaj pneŭoj, sed subite vekas lin eksterordinara bruego: fakte la plej laŭtega, terurega, harhirtiga, sed samtempe mirindega bruego! La kontisto estas tiel ŝokita, ke nur post kvin minutoj li sukcesas memori kie li troviĝas, kaj lia koro preskaŭ reprenas sian normalan takton. Sed ĝuste tiam denove aŭdiĝas la sama bruego!

Ĉi-foje la junulo ellitiĝas, ĉirkaŭpalpas la murojn por trovi la pordon de sia ĉelo, eliras, kaj kuras laŭ mallumaj koridoroj al la fonto de la bruego.

Li baldaŭ alvenas antaŭ tre altan kaj larĝan pordegon. Tie staras la monaĥejestro. La pordego estas almenaŭ kvin metrojn alta, parte ligna, grandparte ŝtala, kaj fermita per dikaj ĉenoj, stangoj, rigliloj, kaj sep ŝeruregoj.

*"Kio estigis tiun bruegon?"* time demandas Ĵeromo. *"Ĉu ĝi troviĝas malantaŭ ĉi tiu pordo?"* La monaĥejestro kapneante respondas: *"Bedaŭrinde, tion mi ne rajtas klarigi al vi, ĉar vi ne estas monaĥo de Sankta Bernardino!"* La juna viro do ekreiras al sia ĉambro, sed post tri paŝoj li denove aŭdas la saman bruegon. Li do petegas: *"Via monaĥejestra moŝto, mi ĵuras al vi, ke mi neniam rivelos vian sekreton, sed bonvolu diri al mi, pri kio temas!"*. Sed la estro seke rebatas: *"Vi ne estas monaĥo de Sankta Bernardino, do vi ekscios nenion!"*. Ĵeromo do reiras en sian ĉambron, reenlitiĝas, sed ne sukcesas endormiĝi, ĉar li senĉese pensas pri la mistera bruego.

Je la 7-a matene, ĝuste kiam li grimpas sur la monaĥejan ĉaron por iri al la plej proksima vilaĝo, li plian fojon aŭdas la bruegon. Li tuj demandas al

la juna monaĥo komisiita veturigi lin: *"Frato, ĉu tiu bruego ne timiĝas vin?"*

*"Tute ne!"* respondas la monaĥo, *"sed al vi mi ne rajtas paroli prie, ĉar vi ne estas monaĥo de Sankta Bernardino!"*.

Tiam la juna kontisto rezignas forveturi, kaj tuj petas renkonti denove la estron. En lia oficejo li surgenuiĝas kaj petegas: *"Mi nepre volas fariĝi monaĥo de Sankta Bernardino! Cetere, mi jam parkerigis la rekantaĵon de via oficiala himno"*. Kaj li vigle kaj entuziasme ekkantas: *"Jen la bela vivo, vivo, vivo, viv, ha! ha! ha! Jen la bela viv' de ĉiuj monaĥoj!"*

La estro duonridetas, sed respondas: *"Nu, la kanzono utilas nur por allogi turistojn! Sed fariĝi unu el niaj monaĥoj ja estas malfacilega afero! Cetere, kiu estas via nuna profesio? De ĝi dependas la plenumendaj taskoj!"* *"Mi estas tre kompetenta kontisto!"* respondas Ĵeromo. *"Ha! Kontisto, ĉu? Tiam..."* decidas la estro, *"vi unue kalkulu tute precize, kiom da steloj brilas en la ĉielo!"*. La junulo ja konscias, ke temas pri ege temporaba tasko, sed li tiel forte deziras malkovri la sekreton de la bruego, ke li senhezite konsentas.

### ► Dimanĉon la 26-an de Januaro

1975 je la 8-a vespere okazas grava evento, kiu ĝisfunde ŝanĝos la vivon de Ĵeromo. Jam pasis pli ol tridek monatoj, dum kiuj li ĉiunokte kuŝis sur la grundo, atentege observis la ĉielon, kalkulis kaj rekalkulis la stelojn, sed neniam atingis dufoje la saman rezulton. Sed ĉi-matene li subite ekhavis genian ideon. Nun li esperplene kuŝiĝas sur la grundon, kaj post kelkaj sekundoj li ekprovos sian novan metodon...

### ► Merkredon la 29-an de Januaro

1975 Ĵeromo firmpaŝe revenas al la monaĥejo. Li sen ia dubo nun konas la precizan nombron de la steloj. Li tuj iras al la oficejo de la monaĥejestro, anoncas al li la rezulton, kaj la estro kaptas kaj eĉ gratulas lin:

*"Vi bonege, precizege, kaj eĉ rapidege laboris! Vi do rajtas nun plenumi la duan taskon: kalkulu kiel eble plej rapide, kiom da sableroj konsistigas ĉiujn strandojn de nia planedo!"*

Kvankam la dua tasko verŝajne estos eĉ pli temporaba ol la unua, Ĵeromo akceptas ĝin, ĉar li farus kion ajn por malkovri la misteran sekreton de la monaĥoj.

► **Lundon la 18-an de Februaro 2013**, pacience kribrinte dum tridek ok jaroj la sablon de ĉiu strando de ĉiu lando, la eksa kontisto finfine revenas al la monaĥejo. Li nun estas maljunulo, kaj la monaĥejestro kompreneble estas ege pli maljuna ol li, kaj eĉ tute blinda kaj surdega.

Ĵeromo devas do laŭtege diri unu post la alia la multegajn ciferojn de la respondo. Sed plurfoje la estro misaŭdas, kaj ĉiufoje devigas lin rekomenci.

► **Jaudon la 21-an de Februaro 2013**, post tri longaj tagoj kaj noktoj, dum kiuj Ĵeromo provis aŭdigi al la surdega kaj blinda estro la precizan nombron de la sableroj, tiu finfine kapjesas kaj solene sed tremvoĉe anoncas: *"Kara Ĵeromo, vi nun rajtas fariĝi monaĥo de Sankta Bernardino! Akompanu min!"*

Ili ambaŭ malrapide lamas laŭ la longaj koridoroj ĝis la altega pordego, kaj Ĵeromo denove aŭdas la harhirtigan sed mirindegan bruegon. Sed ĉi-foje du monaĥoj deprenas la

dikajn ĉenojn kaj stangojn, kaj deŝovas la riglilojn. Nun la estro enigas sep orajn ŝlosilegojn en la sep seruregojn kaj la pordego knare malfermiĝas. Ĵeromo sentime kaj fiere eniras, kaj finfine li ricevas la rekompencan de sia elĉerpa multjara laboro. Li mirege ekvidas tion, kio estigas la teruregan kaj laŭtegan bruegon. Ĝi fakte estas la plej... Ho!!! Ve! Mi preskaŭ perfidis al vi la sekreton! Nu... Kara legantino aŭ kara leganto, kiam vi kapablos sciigi al mi la precizan nombron de la nunaj esperantistoj, ankaŭ vi eble rajtos fariĝi monaĥino aŭ monaĥo de Sankta Bernardino...

Publika humuraĵo  
esperantigita de *Jean HENNEBERT*

## Traduko

# La ĵurnalo de *Cathy Peroni* kaj kompanio (unua parto)

La ĉi-sekventa novelo estas verkita en la franca de la de ni jam konata aŭtoro de "La Telerbretaro". Tio estas:

Verkita de *Lydie BOUVELLE*;

Kiu afable permesis, ke ni tradukos kaj publikigos ŝiajn novelojn; kaj kiun tial ni varme dankegas. Ĉi tiu novelo titoliĝas:

### LA ĴURNALO DE CATHY PERONI KAJ KOMPANIO

Kaj ĝi estas, ankaŭ kiel "La Telerbretaro",  
Alesperantigita de *Jean DIETRICH*

*But nobody wants to know him, they can see he's just a fool. Mi vivas en frenezulejo.*

Mi ne scias de kiom da tempo mi estas en ĝi enfermita. Mi nomiĝas *Cathy PERONI*. Almenaŭ laŭdire; ĉar kiam mi alvokas *Cathy, Cathy PERONI* aŭ *Fraŭlino PERONI*, tio estigas neniun respondon; kaj kiam tiel oni alvokas min, ankaŭ mi ne respondas. Sed ili diras, ke tiel mi estas nomata. Mi estas freneza; sed eksciu, ke mi estas inteligenta. Mi komprenas tion, kion oni diras al mi, tion, kio ĉirkaŭ mi okazas. Kaj vi? Mia problemo – diris al mi la psikiatro – estas manko de identeco. Evidente, mi ne scias, kiu mi estas.

Iam la Doktoro *Nicolas DUGRE-MOBON* lasis min sola en sia oficejo.

Mi profitis la okazon por konsulti

mian dosieron:

*Cathy PERONI*... naskiĝinta la 19-an de Marto 1985 en *Périgueux* (24).

Diagnozo: ne identiganta psikozo. Internigita la 15-an de Majo 2003, sekve al ne solvita delira epizodo.

La pacientino, tiam 18-jara, ellitiĝis post dorma nokto sen incidento. Ŝi petis de siaj gepatroj helpon por malsupreniri la ŝtuparon, kiu kondukis al la kuirejo, kie ŝi deziris matenmanĝi, kion ŝi ne sciis kiel fari. Poste montriĝis, ke ŝi senkonscias pri sia identeco.

La memoro estas sendifekta kaj plu funkcias.

La scikapabla kaj lernada kapableco estas same ne tuŝita, sed la amasiĝitaj fundamentoj de la pacientino ŝajne ne havas signifon por ŝi.

La kuracisto revenis kaj mi ne povis

legi la sekvon. Ĉio ĉi estas ja vera. Mi ne scias, kiu mi estas. Mi eĉ ne scias la signifon de tiu propozicio. Mi ne scias, kion signifas "esti scianta, kiu oni estas". Matene, kiam mi vekiga, mi povas esti tutsame limako aŭ floro aŭ knabo. Tio ne gravas. Ĉiuj opinias, ke tie kuŝas problemo; sed mi, ne.

Kiam mi legis la komencon de mia dosiero, mi tuj pensis pri *Daniel-Paul SCHREBER*. Mi ne scias, ĉu vi konas lin, sed li verkis siajn memoraĵojn, kaj mi legis ilin. Li estis juĝisto, kiu vivis en Germanio, kiu estis difinita kiel frenezulo, tiagrade ke *FREUD* ne volis lin prizorgi. Tiu juĝisto diris, ke li estas ŝanĝiganta en virinon, kaj ke tio estas necesa por savi la mondon. Estas certe, ke temas pri deliro. Tamen li priskribis realaĵojn tute koheran laŭ tiu, kiu konsentas pri la baza principo. Mi pensis pri li, kaj mi diris al mi, ke li eble ne estis tiel freneza kiel supozeble... Ĉiaokaze ne pli ol mi... La vivo en la frenezulejo estas agrabla. Oni estas bone traktata. Ĝi estas luksa frenezulejo. Eksciu, ke ni ĝuas normalan vivon. Mi supozas, ke ekstere tiu normaleco estas ne evidente konceptebla, Sed mi povas certigi al vi, ke ĝi ekzistas. Inter

frenuzuloj oni bone interkonsent-  
antas. Ĉia frenuzeco estas respektinda,  
kaj inter ni ni estas respektemaj.

Ekzemple, ĉiuj tie-ĉi scias, ke mi  
nomiĝas *Cathy*, kaj la frenuzuloj  
ĉirkaŭ mi uzas tiun nomon por min  
alvoki. Kiel dirite, mi ne respondas.  
Nu! Neniu rancoras kontraŭ mi,  
neniu ekkoleras kontraŭ mi. Aŭ ili  
ripetadas, ĝis la bruoj sendita al mi  
reagigas min laŭ ilia deziro; aŭ ili  
frapetas mian ŝultron; aŭ ili plantas  
sin antaŭ mi, riskante okazigi  
kolizion; aŭ ili diras: "Nu! Vi!". Ili estas  
la plej ruzaj, ĉar mi ja sentas min  
koncernata, kiam oni uzas "Nu! Vi!"  
por alvoki min. La frenuzuloj,  
almenaŭ la ĉi-tie-uloj, estas ofte pli  
ruzaj ol la kuracistoj aŭ la dungitoj;  
neniam tiuj uzas "Nu! Vi!". Se tion ili  
farus, ili evitus al si multajn ripetojn.  
Lastfoje kiam mia patrino vizitis min,  
ŝi pasigis fakte la tutan daŭron de sia  
vizito, nomante min "*Cathy, mia kar-  
ulino, mi estas panjo*". Povrulino, ŝi  
mienis tiel elrevigita pro mia ne-  
respondo! Sed, mi ja ne povis  
respondi. La saman matenon mi estis  
vekiĝinta en dinosaŭra bebokorpo.  
Estis belege. Komence mi iom penis  
movi tiun korpon. Ja unuafoje mi  
estis dinosaŭro! Sed tamen mi  
sukcesis min vesti, konvinkiginte, ke  
tio necesas, ĉar la homoj mense sanaj  
ne vidis dinosaŭron sed nur tiun  
faman *Cathy*. Post la matenmanĝo –  
kiun mi dufoje pro mallerteco sur-  
planken faligis – mi vagis en la  
frenuzulejo. Certe mi estis bebo, sed

mi tamen estis multe pli granda ol  
kutime; kaj la vidmaniero, kiun mi  
havis pri la ĉirkaŭo estis tute nova.  
Kiel dinosaŭro mi havis neniun  
nomon. Tion oni devas kompreni.  
Oni ne povas respondi al nomo, kiun  
oni ne havas. Sekve mi ne povis  
respondi al la alvoko de mia  
patrino... Eblas – certe cetere – ke se  
ŝi dirintus "Nu! Vi!", mi respondintus.  
Ne parolante, ĉar dinosaŭro ne parol-  
as, sed mi respondintus, kaj ŝi  
estintus feliĉa.

Estas io mistera. Ofte ni parolas pri tio  
inter ni frenuzuloj, ne trovante klar-  
igon; sed ofte ni finas ride dirante:  
"Eble ili frenuzas el alia frenezo, kiun  
ni ne komprenas". Kial la normalaj  
homoj prizorgas nin kvazaŭ ni estus  
infanoj ne kapablaj tion fari mem? Ni  
ne prizorgas la normalajn homojn. Ni  
ne povas fari la aferojn anstataŭ ili, aŭ  
diri al ili kiel ili devas fari. Estas vere,  
ke tio estas kurioza. Ĉu ne?...

lam, kiam mi ellitiĝis kiel responsa  
adolto, mi diskutis kun persono, kiu  
nomiĝas *Josiane*, kaj kiu estas help-  
flegistino. Ŝi diris al mi, ke ŝi laboras  
ĉi-tie en la frenuzulejo, por prizorgi la  
frenuzulojn; fakte, ŝi diris "la mal-  
sanulojn", kaj ke ŝi havas edzon kaj du  
infanojn. Ŝi aldiris, ke tio plaĉas al ŝi  
labori ĉi-tie, ke ŝi sentas sin utila, ke  
gravas prizorgi "malsanulojn". Mi estis  
tre ĝentila kaj diris "Jes, jes"; sed  
sincere mi opinias, ke tio estas idiota.  
Unue, la frenuzuloj ne estas mal-  
sanaj; kaj krome ŝiaj infanoj kaj edzo  
certe dezirus esti kun ŝi, pli ol ni esti

kun ŝi, kiu estas tute fremda por ni.  
Mi tiun tagon ekkomprenis, ke la  
fakto esti responsa adolto tia, kiaj  
estas mia patrino, aŭ la Doktoro  
*Nicolas DUPRE-MOBON* aŭ *Josiane*,  
ne multe helpas kompreni nian  
aferon.

Fakte mi komprenas, ke vi estas  
leganta mian taglibron. Tiun, kiun mi  
estas verkanta. Eble vi opinias, ke mi  
verkas tiun taglibron antaŭ ol vi estos  
ĝin leganta. Sed tute ne. Mi skribas,  
kaj vi legas. Samtempe. Veras; ĉar se  
ne tiel estus, kiel oni povus klarigi, ke  
mi nun min turnas al vi, en la  
momento kiam mi legas? Atente vi  
rigardu la vorton, kiun vi estas leg-  
anta; ĝi estas tiu vorto, kiun mi estas  
skribanta. Bone! Mi ne scias, kiu  
skribas, sed ankaŭ vi ne scias. Vi ne  
konas min, ne pli ol vi konas *Cathy*.  
Eĉ se vi opinias, ke mia tia diraĵo estas  
freneza, tio ne gravas. Male estas,  
kiam oni estas en frenuzulejo; tio  
estas eĉ rekomendinda. Tion diris al  
mi la sinjoro, kiu konsilis al mi verki  
mian taglibron.

Li estas televida ĵurnalisto. Mi aŭdis, ke  
li havas la cerbon finbruligitan, ĉar li  
tro uzis la narkotaĵojn. Kio estas mir-  
iga, tio estas ke oni povas konsideri  
vera tielan juĝdeflankigon.  
Cerbo finbruligita, tio fumas!  
Kaj lia cerbo ne fumas...

Fino de la unua parto  
(daŭrigota en la venonta numero)...  
Alesperantigita de *Jean DIETRICH*

## Forpaso

### Lilli GILOTEAUX

Forpasis *Lilli GILOTEAUX*, la 26-an de  
Novembro, pro kancero.

*Lilli*, germandevena, venis de esper-  
antista familio kaj aktivis kun sia  
edzo *Lucien* en nia federacio kaj en  
**LEVE**.

Ŝi partoprenis multajn aranĝojn kaj  
faris, interalie por nia gazeto, multajn  
talentajn desegnojn kaj kelkajn  
interesajn tekstojn.

Ni emocie kondolencas al ŝia edzo

*Lucien*, al la filino *Nicole* kaj al la  
nepoj.

Al: *Lucien GILOTEAUX*  
3/6 Allée Bérange  
59170 CROIX

Pli ampleksa artikolo pri la bela kaj  
interesa vivo de *Lilli* sekvos en la  
venonta gazeto

Raportas *Claude LONGUE-ÉPÉE*



Maldekstre: *Lilli* en 1965.

De dekstre: *Lilli* dum la lasta Federacia  
Kongreso en Halluin.

## Atentigo kaj bondeziroj de la redaktoro

Karaj legantoj,

Mi esperas, ke vi agrable travivis la jarfinajn festojn, en familio kaj amikaro.

Mi deziras al vi novan jaron prospera kaj feliĉa, plena de ĝojoj; kiel vi esperante, ke la "kurbo de la senlaboreco baldaŭ kaj rapide inversiĝos" kaj ke la "ekonomia krizo iom post iom stompigos".

Mi memorigas al vi, ke la legantoj de nia gazeto estas ankaŭ ĝiaj redaktoroj; kaj mi ĉiam ricevos kun plezuro kaj atento viajn komentojn, viajn kritikojn, viajn artikolojn (originalojn aŭ tradukaĵojn), viajn fotojn...

Mi esperas, ke en viaj lokaj grupoj kreskas la nombro de viaj kursanoj, de niaj federacioj, de la membroj de *Espéranto-France*.

Kiel mi notis en mia raporto pri niaj rilatoj kun *Espéranto-France*, ne realiĝis la projekto de komuna "kotizo nacia-regiona-grupa", kiu povus ebligi malpliigon de la kotizoj per rabato de la impostoj kaj sekve pligravigon de la respektivaj membraroj.

Ni daŭre baraktos por solvi tiun problemon laŭ bonaj interesaj kondiĉoj, kiuj konservu la nunajn profitojn al nia federacio kaj al niaj lokaj grupoj.

Atendante, vi tamen daŭre baraktu, por varbi samideanojn al niaj organizaĵoj nacia kaj federacia.

Mi supozas ke, kadre de nova regularo de la bazaj lernejoj pri "Novaj lernadaj ritmoj", estas pluraj samideanoj, kiuj kandidatiĝis por informi kaj instrui pri Esperanto en *CM1-CM2* dum "Ĉirkaŭ-lernadaj Aktivajoj". Tiuj volontuloj estu dankataj...

Mi supozas, ke tiu afero kaj nia partopreno efike kompletigus nian nunan klopodadon por "*Espéranto au Baccalauréat*".

Claude **LONGUE-ÉPÉE**

## Asociaj kaj redakciaj informoj

### FÉDÉRATION ESPÉRANTO NORD

**Prezidanto (eldona direktoro de la gazeto):**

*Michel DECHY*

65 Allée Crémaillère  
59650 VILLENEUVE-D'ASCQ  
Tel: 06 16 98 41 02  
[mdechy@esperanto-nord.org](mailto:mdechy@esperanto-nord.org)

### **Sekretario:**

*Katja BOEN*

51 Avenue du Maréchal Leclerc  
59130 LAMBERSART  
Tel: 03 20 92 31 36  
[cboen@esperanto-nord.org](mailto:cboen@esperanto-nord.org)

### **Kasisto:**

*Xavier VILAIN*

Résidence L'Alcyon – Apt. 41  
90 rue du Maréchal Joffre  
59240 DUNKERQUE  
Tel. 06 70 65 93 29  
[xvilain@esperanto-nord.org](mailto:xvilain@esperanto-nord.org)

### **Tarifo de kotizoj:**

13 € por plenkreskulo, 8 € por junulo, studento, senlaborulo.  
Per ĉeko al la ordono de "Fédération Espéranto-Nord" sendota al la kasisto.

### BULTENO "NORDA GAZETO"

#### **Ĉefredaktoro:**

*Claude LONGUE-ÉPÉE*  
320 rue des 4 Bons Dieux  
59235 BERSÉE  
Tel. 03 20 59 28 80  
[plongueepée@free.fr](mailto:plongueepée@free.fr)

#### **Federacia retejo:**

<http://www.esperanto-nord.org>

#### **Konstantaj korespondantoj:**

##### **★ Amiens**

*Cyrille DÉCOUTURE*  
[kontakto@esperanto80.org](mailto:kontakto@esperanto80.org)

##### **★ Arras**

*Jean HENNEBERT*  
[jhennebert@esperanto-nord.org](mailto:jhennebert@esperanto-nord.org)

##### **★ Boulogne**

*Marie-Jeanne LINÉ*  
[mjline@esperanto-nord.org](mailto:mjline@esperanto-nord.org)

##### **★ Dunkerque**

*Elise DEPLA*  
[edepla@yahoo.fr](mailto:edepla@yahoo.fr)

##### **★ Lille-Villeneuve**

*Katja BOEN*  
[cboen@esperanto-nord.org](mailto:cboen@esperanto-nord.org)

##### **★ Valenciennes**

*Jean-Marc FRATARD*  
[jmfratard@esperanto-nord.org](mailto:jmfratard@esperanto-nord.org)

#### **Enpaĝigado:**

*Cyrille DÉCOUTURE*  
10 chemin des Oiseaux  
76270 FESQUES  
[kontakto@esperanto80.org](mailto:kontakto@esperanto80.org)  
Tel: 06 78 80 78 45

#### **Kontrolantoj-korektantoj:**

*Claude Longue-Épée*  
[plongueepée@free.fr](mailto:plongueepée@free.fr)  
*Pascal VILAIN*  
[p.vilain83@orange.fr](mailto:p.vilain83@orange.fr)

#### **Presado, enkovertigo, sendado:**

*Richard VALET*  
Rue du Boulenniez 59235 BERSÉE  
[rf.valet@wanadoo.fr](mailto:rf.valet@wanadoo.fr)

*La tekstoj de artikoloj estu sendotaj antaŭ la 25-a de Aprilo 2014.*

#### **Partoprenis je tiu ĉi numero**

Arlette kaj Edmond PLUTNIAK, Claude LONGUE-ÉPÉE, Xavier DEWIDHEM, Cyrille DÉCOUTURE, Jean HENNEBERT, Elise DEPLA, Michel DECHY, Katja BOEN, Jean-Marc FRATARD, Saliko (Finnlandano), Roland PLATTEAU, Jean DIETRICH, Vincent COUROUBLE,